

ISSN 0023-3692

KVIATO

numero 245 (2011:5)



Poezio
La velka rozo

El Ĉinio
Pentrarto de Ĉinio

Scienco
Energio kaj stelsubstanco

Kian lingvon vi **parolas?**

Lingvoj, menso kaj iom pli...

Ĵak Le Puil: 35 jaroj da sencenzura klinikado



tejo

Tutmonda Esperantista
Junulara Organizo



tejo.org



MANĜI, TRINKI KAJ MEMBRI EN TEJO

Tri bazaj nepraĵoj por povi ĝui la vivon. Ni provu menciigi kelkajn kialojn, kial bonas esti individua membro en TEJO, kvankam ili multegas: Vi estos en kontakto kun tutmonda juna E-komunumo; malkovriĝos al vi bunta kultura diverseco pere de la renovigita revuo Kontakto, kiun ĉiu membro ricevas; tutmonde gastos kaj gastigos pere de Pasporta Servo kaj vi ankaŭ povos pli favorpreze aliĝi al IJK, la plej granda renkontiĝo de junaj esperantistoj el la tuta mondo.

Ĉion pri aliĝo al TEJO vi trovas ĉe:

<http://www.tejo.org/eo/membrigho>



Dumonata socikultura revuo de **Tutmonda Esperantista Junulara Organizo** (TEJO), eldonata de **Universala Esperanto-Asocio** (UEA).

Fondita en 1963.

N-ro 245 (2011:5), 46-a jarkolekto

ISSN 0023-3692.

Legata en ĉ. 90 landoj.

TTT-paĝo: <http://kontakto.tejo.org>.

Eldonanto (administrado, abonoj, anoncoj): UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; tel.: +31 10 436 10 44, fakso: +31 10 436 17 51; ret-adreso: <uea@co.uea.org>.

Redakcio: Kontakto, Rua José Guidini Jr, 229, Ribeirão Preto, SP, Brazilo, 14093-540 <kontakto@tejo.org>

Redaktoro: Rogener Pavinski

Enpaĝigo: Romulo Felicio

Korektado: Rob Moerbeek

Presado: Skonpres, Bydgoszcz (Pollando), <skonpres@poczta.onet.pl>

Konstantaj kunlaborantoj: Aleksander Osincev (Rusio), Sergey Tyrin (Israelo), Alexandre Baudry (Francio), Gabriel Osho-Davies (Niĝerio), Victor Solé (Katalunio), Simmon K. Barney (Usono), Et-suo Miyoshi (Japanio), Ivo Miesen (Nederlando), Vasile Gavrilan (Moldavio). Facillingvaj artikoloj estas verkitaj en la niveloj tre facila kaj facila, laŭ la vortolisto de Kontakto. Tiu listo troviĝas en nia retpaĝo.

Anoncarifoj: tutpaĝa 350 EUR, 1/2-paĝa 190 EUR, 1/4-paĝa 100 EUR, 1/8-paĝa 55 EUR, 1/16-paĝa 30 EUR. Anoncoj sur kovrilpaĝoj kostas duoble. Por E-organizaĵoj 50% da rabato. Varbantoj de ekstermovadaj anoncoj ricevas maklerajon de 30%. Por anoncoj bv. kontakti UEA.

Anoncetoj: por Anonctabulo 0,25 EUR por unu vorto. Bv. sendi rekte al la redakcio aŭ al UEA.

Abontarifo: Varias laŭlande. Kontrolu ĉe nia retejo.

Malfortvidantoj: Estas kelkaj voĉlegitaj artikoloj en nia retejo. Pliajn oni povas peti de Vasile Gavrilan <pangavrilan@gmail.com>. Kasedlegantoj sendu po du kasedojn de 90 minutoj al Rob Moerbeek, Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk, Nederlando. Kun la poŝta glumarko de "Cécogramme" (viro kun blanka bastono).

Kontakto en radioj: Radio 3ZZZ: <http://www.3zzz.com.au/>



ĜD Edukado kaj Kulturo

Tiu ĉi eldono estas financita kun subteno de la Eŭropa Komisiono. La publikaĵo tamen nur reflektas la vidpunkton de la unuopaj aŭtoroj, kaj la Eŭropa Komisiono neniel respondecas pri ajna uzo de la informoj.

La redakcio kaj la eldonanto ne respondecas pri la opinioj de unuopaj aŭtoroj.

Redakcie

Saluton!

Unu jaro kompletiĝas de kiam ni prenis la redaktoran taskon. La pasintjara duobla numero 2010:5&6 estis nia unua, sed ni decidis nur en la venonta numero taksii nian unujaran laboron, ĉar tiam ni ankaŭ kompletigos tutan jarkolekton per lanĉoj de ses numeroj en 2011. Do, ek al priskribo de la antaŭlasta numero de la jaro.

La ĉefartikoloj ĉi-eldone temas pri la plej preferata temo inter la esperantistoj: – Lingvoj. Tion pruvas la fakto ke la ĉi-temaj artikoloj alvenis al nia leterkesto, malgraŭ ke ĝin ni ne anoncis. Pri diversaj interesaj faktoj kaj siaj malkovroj rilataj al lingvoj rakontas Olga Ŝilajeva en sia artikolo "Lingvaj Notoj". Kiel rapide vi legas? Kalkulu mem kaj komprenu tion, kio malhelpas vin legi rapide per la artikolo pri rapidlegado de Rogério Ferreira. Lingvoj estas rimedo por komunikado, sed ne ĉiuj povas komunikiĝi per la samaj rimedoj. Dum vi legas tiujn presitajn vortojn, blinduloj, ekz. ne povas same fari. Tial la brajla skribsistemo estis inventaĵo, kiu malfermis al ili la mondon – pri tiu skribsistemo skribis Sergey Korol. Fine, pri la rilatoj inter Esperanto kaj la latina lingvo verkis Frederiko Lopes.

Dediĉi sin dum 35 jaroj al io, kio samtempe ne estas onia deviga laboro, certe postulas iom pli ol sindonemo. Nepras havi ĝojon per la plenumo de tia aktivaĵo. Tial, eĉ ne dubu ĉu Ĵak Le Puil kun plezuro redaktas kaj kompilas la "Politikan, kulturalan, skandaleman kaj ajnecan" – kaj mi aldonas – unikan, gazeton "La Kancerkliniko". Ĵak respondis niajn demandojn ne nur pri la "zagego" sed ankaŭ pri sia muzika kaj traduka agado.


La blaga blogo ĉi-foje rakontas historion pri juna knabo kiu, kvankam nun li estas plenkreskulo, ne sukcesis forigi la manion tuŝi ĉion kion li vidas. La rubriko El Ĉinio prezentas la pentrarton, kiu karakterizas tiun landon. Iom da poezio kaj scienco vi trovos en la nuna eldono – ili inspiras vian animon kaj instruos vian cerbon. Se tamen ĝiaj lingvaĵoj iom pezas, tuj iru al la facillingva artikolo por senstreĉiĝi kaj ĝui leĝeran tekston.

Kiam ni provis elekti la kovrilon por ĉi tiu eldono, ni faris ion tute novan. Per Interreto ni proponis kvar bildojn kaj petis la esperantistojn decidi kiun uzi por la kovrilo. La nuna kovrilo estis la plej ŝatata kaj la afero tiel bone funkcias ke probable ni daŭrigos, ĉar tiel ni pli komune kreas la revuon. Ĝis la venonta!

Rogener PAVINSKI

ENHAVO

Reagoj, Informe	_____	4
Intervjuo Ĵak Le Puil - 35 jaroj da sencenzura klinikado	_____	5
Poezio La Velka Rozo	_____	8
La blaga blogo Blogo de malliberulo	_____	9
Ĉefartikolo Lingvaj notoj	_____	10
Esperanto kaj latino	_____	11
Rapidlegado - Kiel legi pli rapide kaj komprenefike	_____	12
Brajlo - Ses ŝlosilaj punktoj	_____	14
Facila Kiel antaŭdiri veteron	_____	15
Scienco Energio kaj stelsubstanco	_____	16
El Ĉinio Pentrarto de Ĉinio	_____	18
TEJO tutmonde	_____	20





Viaj reagoj kaj komentoj estas bonvenaj. Kontaktunu nin per la retadreso kontakto@tejo.org

Al mi tre plaĉas la revuo Kontakto. Kiam aperas nova kajero de la revuo, mi ĵetas ĉiujn miajn devojn kaj komencas legi la revuon :)

Olga ŜILAJEVA - Rusio

Mi de longe ne plu estas junulo, sed nepre pluabonos la revuon KONTAKTO! Mi gratulas pro la nova versio! Tre interesa, enhave kaj aspekte! Daŭrigu tiel! Mi konigadas ĝin

Edmond LUDWIG - Francio

Pri la scienca artikolo, ĝi ŝajnis ignori delongan ekziston de "geneca programado", teĥniko en komputila programado, kiu ĝuste kreas kunkuradon inter programoj, tiel ke estas premo evolui, kaj la pli bonaj programoj "reproduktas" novan generacion.

Russ WILLIAMS – Usono/Pollando

Temo-sugestoj

Ĉu vi ŝatus verki por Kontakto, sed mankas inspiro?

Ni proponas al vi kelkajn temojn kiel sugestojn pri artikoloj por venontaj numeroj de Kontakto. Sentu vin libera ankaŭ por fari proponojn. Ni bonvenigas vian partoprenon!

Jen sube la aktualaj temo-sugestoj: (pliaj detaloj pri ili troviĝas en nia retejo kontakto.tejo.org)

#Facila teksto

Kontakto ĉiam bonvenigas facilajn artikolojn pri kiu ajn temo. Legu detalojn kiel verki facilajn en nia retejo.

#USSR - 20 jarojn poste

Decembre en 1991, oficiale disfalis Sovetunio. Kiel vi rigardas tiun eventon, kiu ŝanĝis la mondon? 20 jarojn poste, ĉu socialismo ankoraŭ havas ŝancon pluvivi? Verku pri tiu temo por venonta numero de Kontakto!

#Konsumismo

Ĉu vi aĉetas superflujajn varojn? Ĉu konsumismo helpas disvolviĝon aŭ malsanigas la socion?

#Drogoj

Kiel oni konsciigu pri iliaj danĝeroj? Ĉu la malpermeso estas efika? Ĉu laŭleĝigi ilin estas la plej bona solvo?

#Recikligo kaj rubaĵoj

La destino de rubaĵoj estas akuta problemo en nia nuntempa socio. Recikligo fariĝas pli kaj pli grava kaj necesa en la mondo.

#Tabako

Malgraŭ la nuntempa provo sieĝi ĝian reklamadon kaj konsumadon, cigaredoj estas unu el la plej vendataj produktoj en la mondo.

#Polemikaj tradicioj

Ĉu en via lando aŭ regiono ekzistas polemikaj tradicioj, kiuj ne plu kongruas kun la ĉirkaŭaĵo aŭ kiuj vekas kritikojn el parto de la socio?

#Astrologio

Sciencistoj rigardas la stelaŭguradon kiel ŝajnsanciencon aŭ superstiĉon. Kaj vi, kion vi opinias pri la temo?

#Hejmbestoj

Kian rolon havas la hejmbestoj en la homa vivo?

INFORME

Konkurso

La kultura centro Saint Nazaire en Francio invitas ĉiujn instruistojn, kiuj deziras partoprenigi siajn gelernantojn en la konkurso de infan-desegnaĵoj, kies ĉi-jara temo estas "Eksterlandanoj". Ankaŭ la gepatroj povas partoprenigi siajn infanojn. Pliaj informoj: patchdomo@yahoo.fr

Ni eraris/mankis

En la kovrilo de Kontakto 2011:3 estis misliterumo de la nomo de Irek, "Bobrzrak" anstataŭ la ĝusta "Bobrzak". Mankis la nomo de la aŭtoro de la "facila" rubriko en la numero 2011:4. Ĝi estas Ariadna García GUTIÉRREZ el Kubo.

Kampanjo

Post incendio kiu atingis ĝian stokejon kaj kiu perdigis milon da kordiskoj, la muzik-eldonejo Vinilkosmo lanĉis kampanjon por vendi je malalta prezo ko-diskojn, kiuj ne estis forbruligitaj, sed kies libretoj kaj ujoj estis difektitaj pro la akvo de la fajrobrigadistoj dum la estingo de la fajrego. La liston kun ĉiuj disponeblaj ko-diskoj en tiuj kondiĉoj vi trovos ĉe: <http://www.ipernity.com/blog/vinilkosmo/349653>.



La 18a de septembro 2011, okazis grava fajrego en unu de la elzerejoj de Vinilkosmo kaj sekve atingis la stokejon en kiu detruigis la tuta katalogo de ko-diskoj. Novaj diskoj estas stokita alskizoj malpermesita grava ĉirkaŭaĵo de preskaŭ 6000 diskoj (29 referencoj) ekde 2000 ĝis 2009. Tio-ĉi estas savita disko, veninta kiel subteno por rekonstruado de Vinilkosmo...

Ĵak Le Puil

35 jaroj da sencenzura klinikado

ROGENER PAVINSKI (BRAZILO)

Ĵak Le Puil - kanzonisto, redaktoro kaj tradukisto. Dum sia preskaŭ 40-jara dediĉo al Esperanto, la franco estas unu el tiuj, ne multaj, kiuj tiom longe kaj seninterrompe produktis en plurflanka agado.

Kiel kantisto li jam registris 5 albumojn, el kiuj 4 aperis kasedoforme: "Danĝera Ul'" de 1977, "Revenas mi" de 1982, "De Pont-Aven al Varsovi" de 1985 kaj "Ne donu tro" de 1993. La lasta kaj unua ko-disko estis "Mi estas" de 2004. Kiel tradukisto, ekde 1981 kune kun Armela LeQuint li aperigis preskaŭ dekon da titoloj elfrancigitaj kaj krome li ankaŭ estis ĉefredaktanto de la Franca-Esperanto-vortaro Lepuĭl lanĉita en 1992 kaj por kiu nuntempe planatas suplemento.

Sed verŝajne la plej kara inter liaj "gefiloj" estas La Kancerkliniko, la gazeto, aŭ "zageto" (kiel li mem nomas ĝin), kiu ĉi-jare fariĝas 35-jara. Ne pro tio ke ĝi pli gravas ol la aliaj aktivaĵoj, sed simple ĉar ĝi estas unika.

La gazeto trimonata, kiu havas kiel devizon "Politika, Kultura, Skandalema kaj Ajnista" regule aperadas ekde 1976 kaj estas kvazaŭ simbolo de libereco en la Esperanta arta movado.

En ĝi aperas tute sensensure: poemoj, eseoj, noveloj, politikaj artikoloj kaj desegnoj - kio multe kontribuis al la Esperanto-kulturo kaj certe influis sur aliajn projektojn, kiel la "Vola Püg"-gazeto, kiu ekzistis antaŭ kelkaj jaroj. Malgraŭ tio, la ĉarma gazeto, simplece kunmetita, estas malmulte konata inter esperantistoj, pro tio KONTAKTO decidis doni al vi la ŝancon ekkoni iom pri ĝi kaj pri la senlaca Ĵak Le Puil, kiu malgraŭ pluraj aktivaĵoj, surprizas nin pro la fakto ke li neniam estis plentempa esperantisto.

Kio venis unue, kantado, tradukado aŭ La Kancerkliniko?

Unue kantado en la franca ekde 1961, en Parizaj kabaredoj, junu-lardomoj, kulturdomoj, restoracioj ktp, en Esperanto ekde 1974, en multaj landoj, i.a. en Brazilo en 1988 okaze de la SAT-kongreso kaj dum kvin jaroj en la Esperanta pariza kabaredo "La Ruza Kruĉo". Due, La

Kancerkliniko fine de 1976 kaj trie tradukado ekde 1981.

Kiel kreiĝis LKK?

Trioje, Septier, Danvy, Le Puil, ni prizorgis la gazeton de la junaj SAT-anoj "La Juna Penso". Post artikoloj pri drogoj kaj samseksemeco, ni havis akrajn riproĉojn de la Plenumkomitato de SAT (ni "misuzis" la

monon de la laboristoj!). Tial ni decidis krei "liberan zageton", kie cenzuro ne ekzistos.

Ĝi havas sufiĉe malkutiman nomon por gazeto. Kiel ĝi ekhavis ĝin?

Ni metis plurajn nomojn en ĉapelon, kaj poste elektis hazarde la unuan nomon kiu prezentiĝis! Ĝin proponis Jopetro Danvy. En tiu nomo oni povas vidi ian referencon al la verko de Solĵenicin "La pavilono de l' kanceruloj". Sed antaŭ ĉio ĝi estas ja provokema titolo!

La Kancerkliniko ekzistas jam de 35 jaroj, al kio vi atribuas tion?

Al la fakto ke neniam venis konkurenca "zageto". Ankaŭ al la fakto ke ne ĉiuj e-istoj estas fridpisuloj! Multaj homoj konscias ke nur en LKK ili povas aperigi siajn tekstojn kaj desegnojn: ja ĉiam aperas desegnitaj bendoj, ĉefe de Serge Sire kaj Arnau, en LKK, ofte erotikaj, pornaj por la supre cititaj fridpisuloj!



La 1000-a paĝo de LKK kun karikaturaj de la tiamaj skipanoj

“Politika, Kultura, Skandalema kaj Ajnista”. Ĉu tiu devizo ekzistas ekde la komenco?


Komence LKK estis nur “politika kaj kultura”. Post pluraj atakoj ĝi iĝis

de la jaro”, konkurso kiun li mem kreis la antaŭan jaron! Ankaŭ kun SAT komence ni havis plurajn problemojn kaj la tiama prezidanto de la Plenumkomitato nomis nin, Le Puil, Septier, Danvy – la tri kreintoj de LKK – “La tri sennomaj nuloj”; Sekve de tio, Serge Sire (la kvara musketero, kiu akompanas nin ekde la numero 1 – do tuj post la numero 0) faris desegnon kie la kapoj de la tri estis anstataŭigitaj per grandaj nuloj!

Kiel vi taksas ĝian kontribuon al la Esperanta kulturo? Ĉu ĝi havas la ĝustan prestiĝon kiun ĝi meritas?

Al LKK kontribuis amaso da homoj. Per noveloj, poemoj, desegnoj, eseoj, politikaj artikoloj. El

“Mi estas”, la plej lasta albumo de Jak.



kabaredo, kie mi ankaŭ kantis en la franca ĉiun semajnon. Meznombro ĉeestis kvindek spektantoj. La ĉefaj kontribuantoj estis: Georgo Lagrange, Jopetro Danvy, Solen kaj Arno Lagrange, Serge Sire, Laŭrenco Septier, Armela LeQuint, Michel Audibert kaj du kantistoj Michel Kavlan kaj mi mem. Ankaŭ pluraj nefrancoj estis invititaj; Ĝanfranko Molle, Marĉela (ambaŭ el Italio), Stefan MacGill kaj Loes Demmendaal (Nederlando), Triksini (Germanio), Marilu (Svisio). Post la fino de la ĉiumonata kabaredo, skipo prezentis spektaklojn en diversaj lokoj, i.a. en la UK de 1982 en Antverpeno, kie William Auld diris al ni post nia parodio de la ĉefteatraĵo, ke ĉi lasta pli bonis ol la teatraĵo mem!

“Multaj homoj konscias ke nur en LKK ili povas aperigi siajn tekstojn kaj desegnojn”

plie “skandalema” kaj por montri ke ni fajfas pri ĉiuj kritikoj, ĝi plie iĝis “ajnista” (tion trovis Serge Sire). Ja ankaŭ la ĵus aperinta numero iĝis scienca! Kial ne? Humuro rajtigas ĉion, ĉu ne?

Kiuj estis la skandaloj en LKK?

En la unuaj jaroj kiam ni aperigis poemon de Aldo de ‘Giorgi, iu Napokapo minacis nin pri proceso. Same kiam ni aperigis preskaŭ blankan paĝon por anonci ke Silber gajnis la premion “La verko

la plej konataj, jen William Auld, Reto Rossetti, Georgo Lagrange (S. Elgo), Aldo de ‘Giorgi (ĉiuj kvar bedaŭrinde mortis), Stefan Maul, Istvan Ertl, Jorge Camacho, Kris Long, Michel Duc Goninaz, Mao Zifu, Stefan MacGill, Renato Corsetti, Mikaelo Bronŝtejn, Peter Browne, Ionel Onet, Manuel de Seabra, Arnau... (senkulpigu min tiuj kiujn mi forgesis!). Notindas ke ĉiuj tiuj homoj spontane verkis en LKK. Ni neniam privilegiis konatajn aŭtorojn, kaj larĝbrake akceptis kaj as kaj os tute nekonatajn homojn – gravas nur la kvalito, la originaleco; cenzuro ne ekzistas en LKK, iras rubujen nur la seninteresaj tekstoj! – Ni neniam celis prestiĝon... tamen ne malĝojigis nin konstati ke sep mencioj pri LKK eniris PIV-on – kaj ni eĉ ankaŭ ricevis la premion Grabowski!

Kiel funkciadis la kabaredo “La Ruza Kruĉo”?

Spektaklo okazis po unufoje monate de oktobro 1978 ĝis januaro 1982; dum la unuaj kvar jaroj en kafejoj ĉirkaŭ la placo de l’ Bastilo, kaj la lastan jaron en Montmartra

Kial nur 11 jarojn post via lasta kasedo, vi registris vian unuan ko-diskon?

Ĉar tutsimple mi atendis proponon de iu eldonisto! Mi ne havis sufiĉe da mono por pagi studion kaj muzikiston (mi ja akompanas min per gitaro, sed por disko pli bone ke mi tion ne faru!). Dank’ al Flo (Vinilkosmo) mi povis registri mian unuan K-diskon, kun la akompano de JoMo. Mi nun havas sufiĉe da materialo por dua ko-disko, do eble post malpli ol 10 jaroj tio okazos...

Viaj malnovaj kasedoj jam ne plu aĉeteblas, ĉu vi jam pensis disponigi ilin en Interreto, por ke la pli juna generacio povu koni ilin?

Ne. Mi preferus ke tiuj kasedoj iĝu ko-diskoj! Pri disponigo en interreto povas decidi nur la eldonistoj (Edistudio kaj Vinilkosmo, krom “Ne donu tro”, kiun mi mem eldonis). Kaj vi konas la problemon pri piratado en interreto! Multe kostas registradoj kaj ne ĉio povas esti akirebla senpage. Provu tion ĉe panvendisto kaj mi dubas pri la rezulto!



La unua kasedo de 1978 “Dangera ul” kaj la laste aperinta novelo elfrancigita, “Songoj de Kristalo”, de 2010



Kelkaj kovriiloj de La Kancerklino dum tiuj 35 jaroj da ekzistado

Kiuj estas la kriterioj, per kiuj vi elektas la verkojn kiujn vi trakudas?

Mi ĉiam tradukas librojn kun mia kunulino Armela LeQuint. Ĝis nun aperis: "Florville kaj Courval" de Sade, "La maljunulino kiu paŝis en la maro" de San-Antonio, "Higieno de l' murdisto" de Amélie Nothomb, "Paĉjo, kio estas rasismo?" de Tahar Ben Jelloun, "Vojaĝo ĝis noktofino" de Céline, "Jules Verne esperantisto!" de Lionel Dupuy, "La leciono" de Ionesco, "Songoj de Kristalo" de Jérôme Leroy. La kriterioj estas variaj: unue trovi valoran tekston famkonatan aŭ ne, kaj due provi alfronti defiojn. Ekzemple pri la novelego de la Markizo de Sade "Florville kaj Courval" barakti kun la stilo de la franca lingvo de la dek-oka jarcento, ĉe "La maljunulino" kun slangaĵoj kaj multaj "tabuaj" vortoj, kaj ĉe "Vojaĝo ĝis noktofino" de Céline (unu el la plej grandaj francaj

verkistoj de la dudeka jarcento), kun lia stilo "populara", "slanga".

En la 90-aj jaroj estis kritikoj rilate al la vortaro Franca-Es-

"Cenzuro ne ekzistas en LKK, iras rubujen nur la seninteresaj tekstoj!"

peranto redaktita de vi. Kiel vi nun vidas la aferon? Ĉu vi havas planojn lanĉi novan eldonon de tiu vortaro?

Unue ne nur mi redaktis tiun vortaron, sed skipo, el kiuj la du ĉefaj anoj ja estis mi kaj Jopetro Danvy. Estis kelkaj kritikoj sed ankaŭ multaj laŭdoj (ekz. de Manuel de Seabra, kiu mem faris plurajn vortarojn kaj bone scias pri kio li parolas!). Mi havas planon tre baldaŭ aperi suplementon.

Kiuj estas viaj estontaj planoj, kaj kiun estonton vi vidas por LKK?

Kun Armela mi preskaŭ fintradukis "La lasta minuto antaŭ la sturmo" (356 paĝoj) de juna franca verkisto, tre maldekstre engaĝita kaj pli kaj pli konata, Jérôme Leroy (jam aperis ĉe la Eldonfako de SAT "Songoj de kristalo" de la sama aŭtoro). LKK daŭre aperos, kaj daŭre venas novaj kunlaborantoj al nia Kliniko. Kompreneble ankaŭ plezurigus nin se venus novaj abonantoj. Iam ni sloganis: "LKK, la zageto kiu baldaŭ havos pli da kunlaborantoj ol da abonantoj". Sed tamen pri mono mi ĉiam elturniĝis, ofte kun helpo de kelkaj homoj. Mi ne kredas ke LKK postvivos min, sed mi esperas ke tiam kreiĝos samspeca gazeto. Ĉiel Armela diris al mi ke LKK estas mia "dancistino"... kaj ŝi preferas tiun ĉi al tiuj de iu Stros Kan [1]! Do...

Ĉu vi estas plentempa esperantisto?

Ne! Mi ne estas kaj neniam estis! Tamen ĉiutage pro La KancerKliniko, niaj tradukoj, la korektado de la SAT-Amikara gazeto "La Sago", mia tiea rubriko 'Libro vivas pli longe ol unu sezono', miaj kanzonoj, la reviziado de la vortaro "français-Espéranto" kaj la prezidanteco de la grupo de Bourges (kun la redaktado de ties bulteno)... mi esperantumas dum pluraj horoj! ■

[1] Dominique Strauss-Kahn – Franca politikisto akuzita pri seksperforto kontraŭ hotelĉambristino.



Ĵak Le Puil kaj sia akustika gitaro - la plej malfacila parto de tiu intervjuo estis ekhavi fotojn pri li sen la gitaro

Pliaj informoj pri la gazeto, akireblas ĉe lk@free.fr
 Por aŭskulti fragmentojn el "Mi estas" <http://www.vinilkosmo-mp3.com>

La Velka Rozo

Gabriel ŌSHÓ-DAVIES - Niĝerio

Tiu kiu vivigas min ankaŭ mortigas min
Tiu kiu senĉese provizas sufiĉe da pano kaj vin
Ankaŭ kaŭzas mian eternan malsaton
Li igas min ridi, tamen kaŭzas la mienon mornan,
Li fortigas min, sed lia donaco por mi estas malforto
Ho, kiel liberiĝi je tiu ĉi terura sorto,
Ho, for estu jam tiu ĉi frenezo!

Serĉu por mi ŝtonon, mi restigos mian lacan kapon
en morto,
Miaj flugiloj brulvundiĝis, ĉar min trafis malbona
sorto,
Ne plu malfaldiĝonte, ili ĉe miaj flankoj restos en
malvarmo,
En silenta loko kie nek amo nek malamo ekzistas
Kien oni ĉiam gastigas, tamen senatente, vermojn,
Forestas amantoj, kvankam malamikoj ne plu kaŭzas
ĝemojn
Kaj oni ne observas ĉion kio okazas sub la suno.

Turnas sin – kaj ĉiu atentis ĝian kapricon – la tero,
La granda oceano ondegas kaj tremas ĉiu koro,
La montoj minacas per siaj imponaj ĉeestoj,
La valoj oscedas malsatege, neniam satiĝontaj;
Tamen, malgraŭ tiuj ĉi malfacilaĵoj ĝeneralaj,
Ĉion kion rozoj malhavas, estante fizike malfortaj
kaj palaj,
Ili posedas en beleco kiu senarmigas fortegulojn.

Parolu nun por ke mi sciu ĉu vi vere estas ĉe mi,
Ĉar nenio krom via ĉeesto kapablas sanigi
Tiun ĉi eterne vunditan koron batantan ene de mia
busto.
Malferminte l'okulojn mi vin vidas, ferminte ilin, mi
vin vidas,
Sen vi mi estas nenio, kaj tio al mi plaĉas;
Se mi estas kun vi dum la tero kaj ĉielo forpasas,
Unu jarmilo kun vi jam estus kvazaŭ unu tago.

Ne fariĝinte malseka transmaren mi naĝis pro vi,
Kaj promenante tra danĝeraj lokoj ne timis mi;
Mi vojaĝis milojn da mejloj sed ne laciĝis,
Ĉar miajn timojn kaj kuraĝojn, amojn kaj malamojn,
miajn ĉiojn,
Ĉion ĉi sur vin mi kuŝigas, nur vi estas en la mondo
grava.

Mi antaŭeniris kvankam mi foje ne estis tute bra-
va;

Nu, kara, ĉu mia kapo trovos ripozon en vian si-
non?

Kio estas pri la vivo dezirinda?

Ĉu ĝiaj amaraj streboj aŭ ĉiu vojo blinda?

Ĉu la floroj matene florantaj

Sed subite velkantaj vespere?

Tamen, mi jam trovis kialon por daŭre vivi

Mi jam trovis iun por kiu dediĉos mian vivon mi

Pro vi, mia kara, mi estas daŭre tenaca.

Se vi estas la suno, via brilo volas esti mi;

Faru min la ombro se l'substanco estas vi.

Suno aŭ brilo, substanco aŭ ombro,

Tute ne gravas al mi kiu estas kio;

Se esti kune, nur tiam vivo ne estos sen valoro.

Sed pro ĝia ofte neeviteble trudiĝema doloro,

Eble ĉio ĉi estas odinara fantazio.

Kaj li diras dum firme ŝin en la sinon li provas teni,

Ne gravas kiom longe ni devis promeni,

Ni jam venkis vivon, ni venkis morton;

Ne gravas tio ke ni spertis tiom da problemoj,

Ni venkis tempon, ni venkis spacon;

Ni renkontas ĉi tie kaj havas pacon

Nur pro tio ke por amo nenio estas neebla.

Amo vidas kion ne povas vidi mortaj okuloj,

Amo povas rezisti ĉion pro kio forkuras fortuloj;

Ĝi neniam cedas al la povo de morto,

Amo mokridas la tombon, 'min vi ne povas kapti';

Ĝi vojaĝas laŭ la vojo de anĝeloj sanktaj,

Ne laŭ la irejo de homoj, vivantaj aŭ mortintaj,

Kies vivoj estas, aŭ estis makulitaj per vaneco.

Silento aŭskultas, dum vi parolas, mallumo aten-
tas,

Sed kiu jam divenus, ke en ĉio ĉi, vivo banalaĵo
estas?

Jam velkis la rozo kiun ni plantis en nia fantazio,

Kaj la sunbriloj kiujn ni kreis dum nia revo, jam
subiris;

Nun, ke jam estingiĝas tiu ĉi malgranda flam',

Kaj tiu ĉi juna arbo estas tranĉita jam,

Kie ĉi-nokte nestos la birdo de nia amo? ■



Blogo de malliberulo

Mi memoras, ke, kiam mi estis infano, miaj gepatroj ĉiam admonis min pro la fakto ke mi ĉiam tuŝas ĉion. "Tuŝulo, vi havas la okulojn en la fingroj!" oni ĉiam skolde diris al mi. Temis pri aŭtomata ago. Mi pensis: - Ho, kiel bela floro! kaj mi tuŝis ĝin; ho! kiel bona biciklo! kaj miaj manoj jam prenis ĝin; ho! kiel dezirinda kuko! kaj mi jam havis ĝin enmane... Kiam ni eniris butikon, mia patrino, sperta pro la problemoj, kiujn mia tuŝemo kaŭzadis, ĉiam flustris al mi: metu la manojn en viajn poŝojn! Fakte, plejofte sufiĉis, ke ŝi susuris: "manojn!" Kaj mi obeis, kompreneble, sed miaj manoj moviĝadis ene de la poŝoj, pligrandigante ilin, kvazaŭ ili tuŝis la butikajn vidindaĵojn, kiujn mi avide rigardadis.


Lerneje, mi ankaŭ havis problemetojn. Miaj samklasanoj malpermesis al mi ludi piedpilkon, ĉar mi ne sukcesis ne tuŝi la pilkon mane. "Provu flugpilkadon!" ili kriis al mi. La ideo estis bona, ĉar oni ludas tiun sporton per la manoj. Mi ankaŭ klopodis ludi ĝin, sed la reton oni ne rajtas tuŝi. Kaj mi ĉiam faris tion.

Kiam mi estis junulo, multe da tempo antaŭ ol oni elpensis la modernajn tuŝeblajn ekranojn (kiujn mi multe ŝatas), mi jam klopodis fingre interagi kun la komputilaj ekranoj, malgraŭ ke tia fingrumado estis tute senutila kaj mia ekrano ĉiam estis plenplena de miaj fingraj spuroj.

Certe, miaj fingraj spuroj estas ĉie: en muzeoj, sur skulptaĵoj, monumentoj, konstruaĵoj kaj sur la fenestro-vitroj de ĉiu hotelo, hospitalo, flughaveno, banko... kie mi estis. Mi supozas, ke la scienca polico jam rekonas ilin, malgraŭ ke mi, ĝis nun, ne estis krimulo. Mi povas imagi la policanon klopodantan malkovri la spurojn de krimulo per speciala peniko, kaj subite: ho ve, denove la spuroj de la ĉiama kaj ĉiea tuŝulaĉo!

Nuntempe, kiel plenkreskulo, mi daŭre emas tuŝi ĉion, kion mi vidas. Mi multe devas bremsi min kaj "metu la manojn en viajn poŝojn" estas la patrina frazo, kiun mi plej ofte memoras. Tamen hieraŭ, bedaŭrinde, mi forgesis tiujn saĝajn vortojn kiam belulino eniris en la buson kaj venis sidi ĉe mi, ĉar kiam ŝi pasis ĝuste antaŭ mia sidloko, mi pensis: Ho! kiel belaj mametoj.

Nun, bedaŭrinde, mi devas skribi tiun ĉi mian blogeron mallibereje, kaj aldone al la honteco sentita, mia maldekstra vango estas ankoraŭ ruĝa, ĉar - jes ja - la belulino ankaŭ tuŝis min, sed tiel rapide, ke mi ne rimarkis tion, ĝis mia vango - buse, merite, pune - ruĝiĝis pro la doloro.■



Handwritten signature



Kiu ne scias alilandajn lingvojn, tiu ne scias la propran
J.V.Goeto



Lingvaj notoj

OLGA ŜILAJEVA – RUSIO

Do you speak English? Parlez-vous français? Sprechen Sie Deutsch? Вы говорите по-русски [vyj gavaritje pa ruskijj]? Ĉu vi parolas Esperante? Ĉu vi scias, ke nun en la mondo, se ne konsideri diversajn dialektojn, ekzistas pli ol 4200 puraj lingvoj? Lernado de fremdaj lingvoj malfermas al ni novajn pordojn, kiuj antaŭe ŝajnis por ni fermitaj. Komunikigo kun amikoj-esperantistoj el diversaj landoj, vojaĝoj al Eŭropo kaj konatiĝo kun rusaj lingvistoj vekis mian intereson al lingvoj. Kaj hodiaŭ mi volas iomete rakonti al vi pri miaj lingvaj eltrovaĵoj.

Mi pensas, ke ĉiu esperantisto scias, ke krom nia lingvo Esperanto en la mondo estis kreitaj pli ol mil projektoj de artefari-taj lingvoj, jen kelkaj el ili: solresol, volapuk, idiom, neŭtral, latino-sine-fleksione, ido, okcidental, novial, bejsik ingliš, interlingva, neo, romanid, eljundi, loĵban, glosa, slovio ktp, ktp.

Kaj oficiale la plej lasta projekto estas la planlingvo toki-pono, konstruita de kanada junulino Sonja Elen Kisa. La projekto estis unue publikigita en la interreto en la jaro 2001. La vortkombinaĵon “toki-pono” oni povas traduki kiel “lingvo de bono” aŭ “simpla lingvo”. “Pona” signifas “simpla”, sekve – “bona”: facilaĵo ne povas esti malbona. Toki-pono enhavas ĉirkaŭ 120 vortojn kaj tute malgrandan alfabeton – nur 5 vokalojn (a e i o u) kaj 9 konsonantojn (j k l m n p s t w). En toki-pono estas nur 3 numeraloj: “unu”, “du” kaj “multe”. Kutimaj vortoj en toki-pono transformiĝas en belajn kaj filozofajn metaforojn,

kaj interparolantoj iĝas kvazaŭ poetoj. Ekzemple, la vorto “glaciaĵo” en toki-pono sonas kiel “malmola akvo” (telo kiwen) kaj “aŭtomobilo” – kiel “moviĝanta domo” (tomo tawa). Treege simpla gramatiko donas al ĉiu vastan eblon ekzerciĝi en spritado. Tiu lingvo taŭgas por viva konversacio, sed ne por leteroj aŭ skajpumado, ĉar neniu vin komprenos. Toki-ponon oni povas ellerni

dum du semajnoj, sed oni kutime tre longe lernas, kiel esprimi pensojn por ke la interparolanto ĉion ĝuste komprenu. Jen tia filozofa lingvo.

Kaj pri aliaj faktoj. De mia amiko el Hungario mi eksciis, ke la plej longa vorto en la mondo estas la hungara vorto “megszentségteleníthetlenségkedéseitekért”, kiu enhavas 44 literojn. La traduko en Esperanton estas proksimume la jena: “pro viaj malsanktigiteladecoj”.

Mia amiko el Germanio, kiu skribas sciencverkon pri lingvistiko, rakontis al mi,

ke la plej ĝentila lingvo en la mondo estas la lingvo de eskimoj-inuitoj, kiuj loĝas en Gronlando.

En ilia lingvo ne ekzistas eĉ unu insulta vorto. Ĉiu gento de aborigenoj en Aŭstralio havas propran lingvon, kaj la gento dieri – eĉ du: la unua el ili estas kutima kaj ĉiutaga kaj la duan oni uzas nur por parolado inter bopatrino kaj bofilo. Antaŭ nelonge sciencistoj registris raran lingvon, kiu nomiĝas “susu-ami”. En tiu lingvo parolas nur du familioj el la provinco Morovio (serĉu en Oceanio). Estas interese, ke infanoj komprenas tiun lingvon, sed ne parolas ĝin. Kaj la plej rara lingvo sur nia planedo estas lingvo, kiu nomiĝas “bikja”. Ĝin posedas nur unu 87-jara virino el vilaĝo sur la limo inter Kamerunio kaj Niĝerio.

Mia sciecema germana amiko krom Esperanton, la germanan kaj la anglan regas ankaŭ la kreolan. Tiu kreola lingvo estas lingvo de kreoloj, loĝantaj en Haitio, Sejŝeloj kaj





Vanuatu. Por kompreni subskribon en la kreola, necesas laŭlegi ĝin kaj poste imagi, kiun frazon el originala eŭropa lingvo ĝi similas. Ekzemple, la subskribo "Labank Santral" sur monpapero – estas aliformogita "La Banque Centrale", t.e. Esperante – "La Centra banko". La baza principo de la kreola: kiel vi aŭdas, tiel skribu! Entute en la mondo oni povas trovi 127 specojn de la kreola.

Kaj iom da lingvaj rememoroj kadre de la ĉi-jara IJK. Nia instruisto dum la IJK en Kievo estis bonkora, saĝa, sperta kaj tre interesa esperantisto – Aĥman Junusov el Rusio. Dum kursoj kaj prelegoj li sukcesis rakonti ne nur pri Esperanto, sed li lerte enplektis en la rakontojn ankaŭ temojn pri sia patrujo – la Dagestana provinco (Rusio). Li iufoje diris, ke en Dagestano homoj parolas en la tabasarana lingvo, kiu enhavas 44 kazojn! Ĉu vi povas imagi!

Kaj jen ankoraŭ iom da aliaj lingvaj interesaĵoj, kiujn mi ekaŭdis de miaj rusaj amikoj-lingvistoj.

La plej longa vorto-palindromo en la mondo estas la finna vorto "saippuakivikauppias", kiu signifas "vendisto de steatito (sapŝtono)".

La Princujo de la rivero Hutt estas mikronacio, kiu troviĝas okcidente de Aŭstralio, havas tri oficialajn lingvojn: la anglan, la francan kaj Esperanton(!).

La plej longan alfabeton enhavas la kamboĝa lingvo – 74 literoj!

La Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, kiu estis adoptita kaj proklamita la 10an de decembro 1948 en Parizo, havas tradukojn en 321 lingvojn kaj dialektojn.

Ĉina hieroglifo, kiu signifas "malfacilaĵo" estas skribata kiel "du virinoj sub unu tegmento".

Mi povas babilu pri lingvaj interesaĵoj pli kaj pli, sed mi ne havas eblon rakonti pri ĉio kadre de unu artikolo. Do en la fino de mia rakonto mi diru, ke antaŭ nelonge sciencistoj de la Londona universitato per statistika esplorado konkludis, ke homoj, kiuj ellernas fremdajn lingvojn, havas pli fleksiblan kaj originalan pensadon, ol tiuj, kiuj ne interesiĝas pri lingvoj. Do ni iru kaj lernu! Sukcesojn al ni! ■

Esperanto kaj latino

Kiuj rilatoj ekzistas inter Esperanto kaj la latina lingvo?

FREDERIKO LOPES - BRAZILIO

Multaj el ni jam aŭdis pri la latino. Kelkaj eĉ jam ĝin lernis en lernejoj aŭ universitatoj. Malmultaj tamen ĝin posedas en nivelo de legado, kaj multe malpli en nivelo de parolado. Sed la latina lingvo estas unu el la ĉefaj bazlingvoj de eŭropaj lingvoj, do ankaŭ de Esperanto. Ĉu ni ne bezonus koni ĝin iom pli bone? Kion ni gajnus per tio?

La latina lingvo ekestis en la itala regiono ĉirkaŭ Romo. Dum granda parto de sia historio, ĝi estis lingvo de terkulturistoj kaj bienuloj, poste lingvo de militistoj, politikistoj kaj advokatoj, kaj nun de filozofoj kaj religiuloj vivantaj en Vatikano. Oni atendas, ke la Papo parolu latinon, sed la vero estas, ke eĉ en Vatikano malmultaj fakte ĝin parolas. Ĝi estas nomata malviva lingvo, sed tio ankaŭ ne estas ĝuste la realo.

Mi ne volas paroli pri la movado "Viva Latino". Kontraŭe, mi pensas, ke tiu movado povas atingi nur malmultajn kun granda kvanto da tempo kaj energio disponeblaj. Sed la latino ja atingas vin, kaj faras tion rekte per Esperanto.

La formo de la plimulto de niaj vortoj devenas el latino. Latino estas unu el la lingvoj, kiujn Zamenhof konis. Latino estas la bazo de la vortoj de la franca, kaj iom pli ol duono de la angla. Rusoj bone scias, ke la influo de la franca – do de latino – sur la rusa lingvo estis tre forta. Zamenhof scipovis ankaŭ la rusan, kaj certe rimarkis tion. Ni vidu ankaŭ, ke la sciencaj fakaj vortoj preskaŭ ĉiuj devenas el la latino.

La akordo inter substantivoj kaj adjektivoj en Esperanto devenas el latino. La akuzativo, ordinara lingva trajto de multaj eŭropaj

lingvoj, enestas en latino. La uzo de akuzativo post kelkaj prepozicioj montranta movon estas latinaĵo. Ankaŭ la nevarieco de adverboj estas latina trajto. La simetrio inter la noma sistemo de latino kaj tiu de Esperanto estas tre granda.

La verbaj tempoj de Esperanto kaj iliaj uzadoj per adverboj ŝajnas esti raciigita formo de la latinaj tempoj. En la unua konjugacio de latino, la estanta tempo havas la vokalon "a" en ĉiuj formoj, kaj "i" en la ĉefa estinta tempo. La partecipa sistemo de Esperanto estas genia reguligo de la partecipa sistemo de latino. Oni povas per Esperanto ellabori partecipajn konstruojn respondajn al la latinaj, kaj eĉ doni kelkajn aliajn. Mi ne parolu pri multaj aliaj similecoj rilate la kunordigo kaj subordigo de propozicioj. Tie la kampo estas ja fruktodona.

Esperanto estis la unua dua lingvo, kiun mi parolis. Ĝi restas hodiaŭ mia plej uzata dua lingvo, malgraŭ ke mi, pro profesiaj kialoj, devis lerni la latinan, kiun mi tre amas, kaj kiu estas treege simila al mia gepatra lingvo, la portugala. Mi ĉiam sentis kaj sentas, ke Esperanto estas raciigita, simpligita kaj genie refandita formo de la latina. Mi jam aŭdis, ke ankaŭ ĉinoj vidas Esperanton, malgraŭ ĝia eŭropa formo, tre simila al la ĉina lingvo. Tio estas absolute mirinda!

Kion mi gajnis lerninte la latinon? Krom aliro al majstroverkoj de influegaj Okcidentaj pensuloj, krom pli bona mastrado de mia gepatra lingvo, mi lernis pli ami Esperanton. Multe pli pro tio, ke mi lernis la latinon nur poste, tiam, kiam mi bone lernis Esperanton! ■



Rapidlegado

Kiel legi pli rapide kaj komprenefike

ROGÉRIO FERREIRA – BRAZILLO

Prenu kronometron kaj ekkakulu kiom da tempo vi bezonas por legi tiun ĉi artikolon

Ĉiu ajn alfabetigita homo legas laŭ la sama maniero, sed kelkaj ŝajnas havi specialan kapablon legi pli grandan kvanton da teksto en malpli da tempo ol la averaĝaj personoj. Ili estas nomataj rapidlegantoj.

Bazaj principoj

Legi estas duetapa procezo: la unua nomiĝas mekanika, kio okazas kiam ni kaptas la grafikajn simbolojn per niaj okuloj, aŭ ĉe vidhandikapitoj, per tuŝado sur la brajla skribo; la duan etapon ni povas nomi mensa, ĉar ĝi okazas kiam nia cerbo perceptas, malkodas kaj komprenas la skribitan mesaĝon.

Rapidlegado konsistas el metodo legi kun rapido kaj kompreno. Ordinara leganto legas mezume de 100 ĝis 200 vortojn en minuto. Rapidleganto povas legi trioble pli rapide. Kaj por atingi legorapidon, ni bezonas elimini kelkajn miskutimojn, kiujn ni senrimarke akiras dum nia vivo.

Miskutimoj

Kun la paso de la tempo tiuj miskutimoj enradikiĝas kaj bremsas nian rapidon kaj komprenon pri la legata teksto. Ne facilas forviŝi miskutimojn, ĉar ili naskiĝas nekonscie, sen nia propra volo. Necesas multaj horoj da ekzerciĝado por tute aŭ parte ŝanĝi tiujn kutimojn. Jen kelkaj el ili:

Regreso / Laŭtlegado / Subartikulacio / Kapmovo / Legi vorton post vorto / Malĝusta sidado

Regreso: Regreso estas la ago ree




Rapideco je legado postulas trejnadon

legi vortojn aŭ eĉ tutajn frazojn pensante, ke tiamaniere ni povas kapti pli bone la sencon de la mesaĝo. Legantoj kiuj ne sukcesas memori kion ili ĵus legis, pensas ke regresante al la komenco de la linio aŭ eĉ de la paragrafo, ili komprenos pli bone la signifon de la teksto. Sed tio estas erara, ĉar la sencon de la mesaĝo ni kaptas laŭ la kunteksto, ne laŭ izolitaj vortoj aŭ frazoj. Tiel regreso baras al ni la vojon al rapido kaj al la vera kompreno pri la ideo de la legata teksto. Krome, tiuj, kiuj havas tiun miskutimon, ne sukcesas plene ĝui kompletan koncentriĝon sur la legaĵo, ĉar ili nekonscie uzas tiun artifikon kiam ilia atento fordrivas al aliaj pensoj. Eliminante tiun miskutimon, ni akriĝas nian atenton kaj disvolvas nian koncentropovon.

Laŭtlegado: Kelkaj personoj ŝatas laŭtlegi, ĝuste prononcante ĉiujn vortojn, kvazaŭ ili legus al iu alia. Tiu miskutimo bremsas la rapidon, ĉar legante tiamaniere nia cerbo bezonas sendi ordonojn al niaj parolorganoj, por ke ili estigu sonon, movu la voĉkordojn,

prononcu vortojn ktp, anstataŭ nur "kapti" la sencon de la skribita mesaĝo. Substrekinde estas, ke ni ne kondamnas tian laŭtan legadon, eĉ kontraŭe, ĝi taŭgas por bone lerni prononcadon, por parkerigi poemojn aŭ nur komune ĝui legatan tekston. Sed por rompi la malrapidon en la legado, bezonatas estingi ankaŭ tiun miskutimon.

Subartikulacio: Subartikulacio estas la ago "mense" legi la vortojn de la teksto. Ĝi okazas kiam ni ne prononcas la vortojn, sed "pensas" pri ili. Eĉ estante nur mensa, ankaŭ ĝi prezentas baron al la disvolvo de



rapido en la legado. Ĝi konsistas en la plej malfacile eliminebla miskutimo kaj eĉ spertaj rapidlegantoj ne sukcesas centprocente forigi ĝin.

Kapmovo: Unu el la plej oftaj eraroj ĉe legantoj estas la malrekomen- dinda kapmovo. Kelkaj opinias, ke movante la kapon ili pli facile povas akompani la movon de la okuloj. Farante tion, ni malhelpas la enfokusigon de niaj okuloj kaj malrapidigas nian legadon. Niaj okuloj funkcias kvazaŭ fotilo, kiu "kaptas" la bildojn de la vortoj por nia cerbo. Kiam ni movas la kapon, niaj okuloj ne sukcesas bone "foti" la vortojn por sendi ilian signifon al nia menso. Tial ni devas restigi nian kapon senmova kaj permesi, ke nur niaj okuloj saltu laŭ la frazoj.

Legi vorton post vorto: Kiam ni legas, niaj vidorganoj ŝajnas dolĉe gliti sur la papero, de maldekstre dekstren, linion post linio. Sed tiu koncepto estas erara, ĉar niaj okuloj ne kapablas vidi dum movo. Ili bezonas halti por kapti la bildon, kaj tial ili faras malgrandajn, nerimarkeblajn saltojn de unu vorto al alia. Ordinara leganto faras mezume ses aŭ ok okulsaltojn dum la legado de unu linio. Konsiderante ke unu paĝo de libro havas pli-malpli dudek, dudek kvin liniojn, kalkulu kiom da saltoj niaj okuloj devas fari por kovri tutan paĝon! Ne senkaŭze multaj homoj plendas pro kapdoloro aŭ pigro kiam ili komencas legi! Rapidleganto trejnas siajn okulojn per specifaj ekzercoj, horojn post horoj, por ke ili sukcesu "foti" kiom eble plej da vortoj

per unu sola fojo. anstataŭ ok saltojn, la okuloj povas fari nur tri aŭ du en ĉiu linio.


Malĝusta sidado: Se ni sidas malĝuste por legi, ni komencas senti laciĝon, doloron en la dorso, pigron, dormemon (ĉefe se ni kutimas kuŝi por legi), mankon de atento ktp. Ankaŭ malbona aŭ nesufiĉa lumo obstaklas la legadon. Dum legado ni ĉiam provu sidi kun la dorso tute apogita al la seĝo, rekte kaj sen kurbiĝo. La lumo devas trafi la libron aŭ la tekston sen troigo. Ni devas teni la libron pli-malpli kvardek centimetrojn for de la okuloj, tiel ke ni ne bezonu movi la kapon por legi de la komenco de la linio ĝis la fino kaj de la supro de la paĝo ĝis la malsupro. Se ni portas okulvitrojn, ni certigu ke ili estu ĝustaj kaj puraj. Kaj neniam estas troo averti, ke ni ne legu kuŝante, ĉar tiu pozicio favoras dormemon, ne legadon.

Legu de pluraj vortoj

Rapidleganto ne kaptas izolitajn vortojn, anstataŭe li provas kapti plurajn vortojn per unu fojo. Ekzistas ekzercoj kiuj ampleksigas nian vidkampon, sed nur la pacienco kaj multhora trejniĝo povas garantii plenan sukceson. Fiksi la okulojn iom super la linio (en tiu blanka spaco inter du linioj) dum la legado akcelas la rapidon, samtempe kiam ni legas pli da vortoj kun malmultaj okulsaltoj.

Koncentriĝo

Por plene kompreni tekston ni bezonas koncentriĝi kiom eble plej multe. Kaj tion ni povas atingi nur pere de nia propra fortostreĉo kaj praktikado. Klopodi elimini fremdajn pensojn dum legado kaj ankaŭ provi ne pensi pri niaj personaj problemoj povas ŝajni malfacile, sed ju pli ni enfokusigas nian atenton sur la objekto de nia legado des pli kreskas nia koncentropovo. Ni devas serĉi adekvatan lokon por legi, se ni deziras ke ankaŭ la bruoj nin ĉirkaŭantaj ne malhelpu nin.



Antaŭlego

Antaŭlegi estas lasi ke niaj okuloj vagu sur la legota teksto sekvante specifajn teknikojn. La celo de la antaŭlego estas prepari nian cerbon kaj atenton por la vera legado. Dum la antaŭlego niaj okuloj simple glitas sur la papero serĉante nur la kernan ideon kaj ĉefajn punktojn de iu temo. Estas tio kion ni faras kiam ni foliumas libron en librovendejo, decidante ĉu ni aĉetu ĝin aŭ ne. Tiu procezo devas esti tre rapida kaj ne konsumi pli ol kelkajn sekundojn.

Vortprovizo

Ne malofte dum legado ni renkontas vortojn fremdajn al ni, vortojn kies signifon ni tute ne scias aŭ nur deduktas el la kunteksto. La plej adekvata sinteno antaŭ tiaj vortoj estas ne tuj haltigi la legadon por konsulti ilin en vortaro, por ne rompi la ĉenon de la rezonado, sed plu legi kaj provi kompreni la signifon laŭ la kunteksto. Nur poste ni devas serĉi ilin en la vortaro, kopii la difinojn sur papero kaj formi frazojn kun tiuj novaj vortoj. Ni legu tiujn frazojn kiujn ni verkis, laŭtvoĉe. Tiamaniere ili fiksiĝas en nia memoro kaj ni ne plu forgesos ilin.

Konkludo

La temo pri rapidlegado estas tre vasta kaj unu sola artikolo ne povas ampleksi la tuton. Mi konsilas tiujn, kiuj deziras enprofundiĝi, serĉi honestajn kaj lertajn instruistojn kiuj povas pli intime prezenti al ili la arton de la rapidlegado. Sed pli grave ol la kapablo legi rapide estas neniam ĉesi ĝui la akompanion de bonaj kaj inspiraj libroj. ■

Brajlo

Ses ŝlosilaj punktoj

SERGEJ KOROL - RUSIO
 REDAKTITA DE ALEKSANDER OSINCEV - RUSIO

Brajlo estas mirinda inventaĵo de la homaro, ĝi estas ponto inter blinduloj kaj la mondo. Nur imagu, ke ses reliefaj punktoj povas helpi al vidhandikapuloj legi, skribi, muziki, studi kemion, fizikon kaj multe da aliaj fakoj. Kaj nun pri ĉio pli detale.

Blindula Historio

Reliefskribo ne estis inventaĵo por blindaj homoj, kiuj arde volis ricevi novajn informojn. Kiam la juna inventanto de brajlo Louis Braille [lŭi braj] lernis en lernejo por blindaj infanoj - 3-jaraĝa li vundis siajn okulojn per tajlora aleno de sia patro, blinduloj povis legi nur specialajn librojn, presitajn per relief-linia tiparo. Verdire, ĝi aspektis kiel kutimaj literoj, elstarantaj sur la surfaco de paĝo kaj blindulo devis ĉirkaŭpalpi ĉiun literon. Tio okupadis minutojn kaj la leganto forgesadis la komencon de la frazo antaŭ ol li finlegadis ĝin. Krom tio la produktado de tiaj libroj estis tre multekosta, la lernejo por blinduloj posedis nur dekkvin tiajn librojn!

Louis Braille komprenis, ke la ekzistanta sistemo ne kontentigas vidhandikapulojn kaj li revis perfektigi ĝin. La impulson por kreado de brajlo donis la sistemo de la franca artileria oficiro Charles Barbier de la Serre, kiu proponis uzi «nevideblan skribadon» por transdoni paf-koordinatojn inter artileriaj brigadoj, ĉar uzi kandelon por legi signifis malŝanĝi sin. «Nevidebla skribado» de Barbier estas skrib-fiksado de ciferoj sur papero per specialaj truetoj. Tiu maniero estis

uzebla, sed estas tre malrapida kaj komplika: sur unu folio oni apenaŭ povis skribi la tutan frazon. Kaj tiam Braille inventis alian metodon: fari ne truetojn, sed elpremaĵojn en papero, tiel, ke en papero aperadis reliefaj punktoj, kiujn blindulo povas legi per la fingroj. Tiel naskiĝis brajlo, kiun oni povas vidi nun, sed kun grandaj ŝanĝoj.

Ses punktoj

En brajlo kiel bazo estas ses punktoj, ordigitaj en du kolumnoj (po tri punktoj en ĉiu). Tiu sistemo ebligas kodigi ĉiujn literojn de ĉiu alfabeto, ciferojn, interpunkcion kaj specialajn signojn: ankaŭ kemiajn kaj matematikajn. Ses punktoj en du kolumnoj havas 63 kombinaĵojn, tio sufiĉas por skribado kaj legado.

Tiel aspektas la vorto "Esperanto" brajle:

• • • • • • • • • •

La punktoj estas malgrandaj, sed oni facile povas legi ilin per la fingroj. Havante sufiĉan sperton, oni scipovas legi brajle tre rapide. Nuntempe ne ekzistas problemoj eldoni librojn, skribitajn brajle, samkiel oni preskaŭ

ne havas problemojn aĉeti tiajn librojn, sed skribi permane estas daŭre iom malfacile.

Unue, por skribi brajle oni devas uzi specialajn ilojn: stifton kaj ŝablonon. Blindulo devas premi punktojn per stifo en dika paperfolio, helpante al si per ŝablono. La ĉefa malfacilaĵo estas, ke li devas fari tion spegule. Verdire, oni devis tion fari antaŭe, sed nun ekzistas multe da specialaj tajpiloj kaj klavaroj kaj ankaŭ specialaj ekranoj, kiuj aŭtomate montras la informon brajle. Nuntempe vidhandikapulo povas uzi komputilon kaj interreton sen ajna limigo.

Brajlaj perspektivoj

Sendube, neniu blindulo povas imagi sian vivon sen brajlo, foje tio estas la sola maniero skribi aŭ legi ion. Brajlo realigis la revon de Esperanto kaj iĝis komuna internacia sistemo, sed nur inter blinduloj. Tamen ankaŭ brajlo havas kelkajn problemojn kaj malfacilaĵojn:

- Skribi kaj legi brajle libere povas nur blinduloj, por vidpovulo brajlo estas ĉifro. Tio malfaciligas la komprenon inter blindulo kaj lia vidpova instruisto.
- Legante per la fingroj, oni malfacile



Louis Braille - Inventinto de la brajla skribsistemo

povas atingi bonan rapidecon. La samo koncernas la skribadon.

•Lerni brajlon estas facila afero por tiuj, kiuj naskiĝis blindaj aŭ por tiuj, kiuj perdis la vidkapablon junaĝe. Lernado por plenkreskuloj aŭ maljunuloj iĝas granda defio.

Pro tiuj malfacilaĵoj hodiaŭ kreskas intereso por la tiparo de Moon (malmulte uzata ekster Britio, kie ĝi aperis), kiu estas varianto de relief-linia tiparo, uzanta simpligitajn literkonturojn. . Tiun tiparon povas legi kaj vidpovaj, kaj blindaj homoj. Ĝin eblas tre simple lerni kaj rapide legi. Iom post iom disvastiĝas specialaj sistemoj de prezentado de brajlo. Ekzemple, oni povas uzi specialan ganton, kiu diversmaniere premas fingrojn, informante la posedanton.

Sed restas konstanta la fakto, ke brajlo estas unu al la plej disvastigitaj sistemoj de skriba komunikado inter vidhandikapuloj en la mondo kaj estas unu el la plej mirindaj skribsistemoj. ■



Tradukileto por brajlo
<http://traduku.net/brajle/>

LIBE - Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj
<http://libe.narzan.com/>

Kiel antaŭdiri veteron

FRANCISCO WECHSLER – BRAZILIO

Indiĝenoj iras al sia estro kaj demandas lin:

— Alt-estimata estro, ni bezonas scii, kiom malvarma estos la venonta vintro, por ke ni komencu kolekti brul-lignon.

La Indiĝen-estro pri-pensas la aferon dum iom da tempo kaj fine diras:

— Lasu min sola, por ke mi povu demandi la Grandan Spiriton.

Kiam la Indiĝenoj eliras el la domo de sia estro, li telefonas al la veter-servo:

— Bon-volu informi, kiom malvarma estos la venonta vintro...

La oficisto respondas:

— Nu... ĉio montras, ke la venonta vintro estos iom pli malvarma ol ordinare.

— Ĉu vere? — diras la estro. — Dankon! — Kaj li tuj ek-krias al la ceteraj indiĝenoj:

— Komencu kolekti brul-lignon tuj, ĉar ni spertos tre malvarman vintron!

Kaj la tuta indiĝenaro kolektadas lignon dum pluraj semajnoj. Fine, jam lacaj, ili iras al sia estro kaj demandas lin:

— Alt-estimata kaj saĝa estro, ĉu la ligno kolektita sufiĉos?

La estro pri-pensas sian respondon kaj denove diras:

— Lasu min sola, por ke mi povu demandi la Grandan Spiriton. — Li denove telefonas al la veter-servo:

— Bon-volu informi, ĉu la venonta vintro estos tre malvarma...

— Jes, ni refaris niajn kalkulojn, fakte ĝi estos multe pli malvarma ol ordinare.

La estro tre maltrankviliĝas kaj kole-re ek-krias al siaj sub-uloj:

— Tiom da ligno tute ne sufiĉos! Vi bezonas kolekti almenaŭ la trioblond!

Kaj la indiĝenoj kolektas, kolektas, kolektas... Post unu monato da senĉesa kolektado, lacegaj, ili reiras al sia estro kaj, preskaŭ plorante, plendas:

— Alt-estimata, saĝega kaj amata estro, ni estas tiel lacaj, ke ni ne sukcesas kolekti eĉ unu plian lignopecon! Kompatu nin! Ĉu nun la kvanto sufiĉos?

La estro el-ir-igas ilin kaj unu plian fojon telefonas al la veter-oficisto:

— Bon-volu informi, ĉu la antaŭ-diro pri la vintro ankoraŭ estas vera...

— Bedaŭrinde ne... ĉio klarege montras, ke la venonta vintro estos sen-dube la plej forta en la lastaj cent jaroj!

La estro timegante ekkrias:

— La Granda Spirito gardu nin de tia malfeliĉo! Sed... kiel vi scias? Kiel vi povas esti tiom certaj?

Kaj la oficisto trankvile respondas:

— Facile... Indiĝenoj jam de multaj monatoj kolektadas brul-lignon kiel frenezuloj! ■



Indiĝeno: Landano, kiu devenas de la praloĝantoj de la lando

Oficisto: Homo, kiu profesie plenumas oficon; funkciulo

El la retejo *Facila Vento*. [facila.org]
Permesilo: CC BY-NC 3.0

Energio kaj stelsubstanco

GREGORIO NAÇU - KANADO



Albert Einstein antaŭvidis per matematikaj modeloj ke la kerno de atomoj devas havi neimageble grandan kvanton da energio. Kaj kun tiuj informoj enmane li urĝis la usonan registaron prilabori la kreadon de la unua atoma bombo. Evidente li kaj la modeloj estis ĝustaj, ĉar sukcese la bombo eksplodis en granda spektakla montro de potenco nenie antaŭe vidita.

Dum la sekvaj jardekoj ni ofte miras pri lia genieco, kaj scivolas kiel li iam trafis la konkludojn ke la substanco de ĉiutaga materio entenas tiom da potenco. Vere li estis geniulo pro tio ke li estis la unua homo kiu sekvis la spurojn de la detaletoj de la natura universo


al preskaŭ absurda nivelo, kie la malkovroj povas uziĝi en eminente praktika maniero.

Ĉe retrorigardo estas klare, eĉ tute necese, kial ŝajne ordinara materio devas havi enorman kvanton da energio. Sed por kompreni kial, necesos unue ke ni diskutu la energion mem. Neniu povas diri ĝuste kio ĝi estas, krom ke ĝi estas forto kiu havas efikon sur la movan staton de materio. Estas du tipoj de energio, kineta kaj potenciala, malnete tiuj estas movanta kaj nemovanta. La koncepto de potenciala energio frustre konfuzis min, ĉar mi volis fleksi mian menson ĉirkaŭ tio kio ĝi vere estas, sed dum longa tempo satiga solvo evitis min. Espereble ĉi artikolo helpos vin lerni pri tio kion mi baraktis por lerni antaŭ jaroj.

Imagu situacion en kiu ŝtono kuŝas sur la rando de krutaĵo. Oni ofte diras ke la ŝtono enhavas iom da potenciala energio. Kial? Ĉar ĝi povas facile fali kaj per la falo tiu potencialo ŝanĝiĝas al kineta energio. Kiam la ŝtono atingas la fundon,

la kineta energio transiras de la moviĝanta ŝtono en tion kion ajn ĝi frapas. Tie la ŝtono haltas kaj eble io, kion la ŝtono frapis, frakasiĝas, tiu produktos varmon, sonon kaj ondetojn en la ĉirkaŭa grundo kaj aliajn subtilajn energioformojn. Ĉiuj tiuj estas aliaj formoj de energio kiuj kune perfekte egalas la perdon de la potenciala energio kiun havis la ŝtono antaŭ sia falo. Tiu ja povus esti la priskribo de mezlerneja instruisto, kaj estas precize tio, kion mi trovis konfuza. Mi ĉiam estis instruita ke la ŝtono havas potencialan energion, kio implicas ke tiu energio estas kiel aĵo kiu povas esti posedata. Kio do estus tio, kion la ŝtono efektive havis? La ŝtono verdire ne havis ion ajn, kio ne ankaŭ estis en la krutaĵo kaj la fundo kaj la frakasitaĵo. Ni povas vidi la problemon per simpla penseksperimento. Imagu nun ke ŝtono kuŝas sur plata ebenaĵo. Ĝi havas neniun lokon por fali kaj do, per la ĉi-supra logiko ĝi ne havas potencialan energion. Sed nun imagu ke oni fokus grandan truon tuj apud la ŝtono, zorgeme ne tuŝante la ŝtonon mem. En tiu nova situacio la ŝtono denove troviĝas kuŝanta ĉe la rando de granda truo kaj denove ĝi devas havi potencialan energion, sed ĉu tio signifas ke ni enmetis ian mistikan substancan en la ŝtonon eĉ sen tuŝi ĝin? Kompreneble ne. La evidenta konkludo estas ke ne estas la ŝtono kiu enhavas ion specialan, sed la potencialo estas mezuro de energio (energio nune senmova) inter la rilataj partoj de la tuta komplekso aŭ la tuta sistemo. Ni agis per la ŝovelado kaj elspezis energion por movi la teron for de la ŝtono kaj per tiu agado enkondukis novan rilaton inter la ŝtono kaj la fundo de la truo, lasante la kompleksan multpartan sistemon kun ia kvanto de tiel nomata potenciala energio.

La malsameco inter la du situacioj, la unua kun la ŝtono sur ebenaĵo kaj la dua kun la ŝtono apud truo,





pistas malpezajn elementojn en pli pezajn elementojn. Tamen, eble vi povas memori de la mezlernejo ke elektre ŝargitaj eroj kiuj estas aŭ ambaŭ pozitivaj aŭ ambaŭ negativaj, forpuŝigos unu de la alia, dum tiuj kiuj estas malsame ŝargitaj allogas sin. Ĉiu nukleano (ero en la kerno de atomo), estas aŭ pozitive ŝargita aŭ estas neŭtrala. La neŭtraluloj nek forpuŝas nek allogas sin kaj do por nun mi ignoras tiajn. Sed la pozitive ŝargitaj eroj en la kerno de hidrogeno devus forpuŝi sin for de la kerno de aliaj, do kiel povas esti ke ili restu kune por formi la kernojn de la aliaj elementoj? La sekreto estas ke ekzistas alia forto, kiu efikas nur inter tre tre proksimaj punktoj, trans nur tre tre malgrandaj distancoj. Kiam la grandega pezoforto de stelo premas la malallogajn erojn sufiĉe proksimen unu al la alia, la mallongdistanca forto efektiviĝas kaj agas kiel kroĉilo, kiu tenas la pozitivajn erojn kune kontraŭ ilian naturan tendencan dispeciĝi kaj rapide disflugi.

La konkludo estas rava. Atomo tutsimple ne estas unu solida aŭ

temas plej grave pri la stabileco de la sistemo. Estas facile vidi ke ŝtono apud truo estas iom stabila, nenio aktive moviĝas, la ŝtono simple kuŝas tie. Sed same facilas vidi ke ŝtono apud truo estas multe malpli stabila ol ŝtono apud nenia truo. Ekzistas multaj facile imageblaj aranĝoj de partoj kiuj estas pli-malpli stabilaj sed kiuj bezonas iom da laboro por eniri tiun staton. Kiam mi estis infano, amuza ludo kun miaj amikoj estis preni kvin tiajn platajn bastonetojn de glaciajaj manĝetoj, kaj zorgeme aranĝi ilin tiel ke ili fariĝas en stelformo, ĉiu puŝanta kontraŭ la aliaj tiel ke neniu el ili povas moviĝi. La rezulto estas unuopa formo farita el kvin bastonetoj, kiu pro la speciala aranĝo estas dumtempe stabila. La amuzo venas kiam la formo estas ĵetita al muro aŭ sur la plankon. La ŝoko malstabiligas la formon kaj la bastonetoj sendanĝere disflugiĝas. Notinde, oni devas puŝi la bastonetojn, tenante la aliajn por ke ili ne moviĝu, kaj estas evidente ke ne malgranda kvanto da energio devas esti puŝita en la formon, sed tiam, kiel magio, la formo stabiligiĝas en la manoj. Unu bastoneto puŝas kontraŭ la alia kaj tiu puŝas kontraŭ la sekva en ripeta ŝablono ĉirkaŭ la tuto. La energio certe estas en la formo, sed kaptita pro la dumtempe stabila aranĝo.

Nun ni ŝanĝu nian fokuson de la ludoj de infanoj al la originoj de la universo. Ĉia materio estas farita el konstrublokoj nomataj atomoj. Atoma speco nomiĝas elemento. La grava distingo inter la elementoj estas la nombro da nukleanoj, eroj kiuj estas en la kerno. Tiu nombro influas kiom da elektronoj la atomo povas havi kaj

kiel la atomoj ligiĝas al aliaj atomoj por fari substancojn sufiĉe grandajn por esti videblaj. Neniu povas diri finfine de kie la universo devenis, sed unu fakto, kiun ni ja scias estas ke en la frua universo la densaj pezaj elementoj ne ekzistis. Hidrogena atomo, elemento farita el nur unu nukleano, estis abunda en la frua universo, fakte ankoraŭ hodiaŭ estas la plej abunda elemento en ekzisto. Se tio estas vera, do, de kie venis la ceteraj de la pli pezaj specoj de atomo?

La mallonga respondo estas ke la flagretantaj steloj fabrikis kaj ankoraŭ fabrikas la pli pezajn elementojn. Nia suno, kiu estas nur unu el la vasta ĉiela maro de steloj, konsistas el 91% hidrogenaj atomoj, kaj 99,9% de la suno estas aŭ hidrogenaj aŭ heliumaj atomoj. Heliumo estas la dua plej malpeza atomo. Do, ni vidas ke la suno estas preskaŭ tute farita el grandegaj nombroj de la du plej simplaj atomoj. La suno estas tricent tridek tri mil oble (333 000x) pli peza ol la tero. Tiu amasego da atomoj kiuj estas en la suno, estas sub tiel granda pezoforta premo ke ĝi laŭlitere pistas hidrogenajn atomojn kune ĝis ili fariĝas heliumaj atomoj, la premeĝo



kompleksa stelformajxo



kutima stelformajxo



kvadrata stelformajxo

fundamenta aĵo. Ĝi estas farita el partoj, kiuj volas disiĝi pro siaj elektraj ŝargoj, sed kiuj estas tenataj dumtempe en proksima stabila aranĝo. Ĉu tio memorigas vin pri io alia, kiun ni ĵus diskutis? La kialo kial atomoj, eĉ de ordinara materio, inkluzive la materion kiu konsistigas vian propran korpon, entenas grandegan kvanton da energio, estas ĉar la pezaj atomaj elementoj ne simple ekzistas kaj ĉiame estis tiaj kiaj ili nun estas, tute ne. Ili estas kompleksaj stabilaj aranĝoj de partoj kiuj bezonis ne nur la energion de la manoj de petolemaj infanoj por aranĝi ilin, sed ili bezonas la astronomie grandan kvanton da energio nur troveblan en la koro de steloj. Kaj estas tia skalo de energio kiu estas kaptita en la aranĝo de atomoj kiam ili stabiligiĝas. ■

Pentrarto de Ĉinio

YI MING - ĈINIO

La historio de la ĉina pentrarto komenciĝis en neolitiko, antaŭ 5000 - 6000 jaroj. Tiam jam vidiĝis desegnoj, homaj kaj bestaj figuroj sur koloraj ceramikaĵoj. La hieroglifaĵoj de Ĉinio antaŭ miloj da jaroj estis bildoj formitaj el strekoj, kiuj poste evoluis en la hodiaŭajn ideogramojn. Komence oni pentris kaj skribis ĉefe strekojn per sama ilo, tial ĉinoj diras, ke kaligrafio kaj pentrarto estas de la sama origino. Ĝuste pro tio ĉinaj kaligrafoj plejparte estas ankaŭ pentristoj, kaj pentristoj-kaligrafoj.

Unu el la trajtoj de la ĉina pentrarto estas pentri per simplaj strekoj. Oni ne nur ekzakte pentras bildon per strekoj, sed ankaŭ dotas ilin per rigideco, mildeco, rigoreco, flirteco... eĉ unu sama streko povas havi variajn ecojn por montri la internan senton de la pentristo.

Alia ĉefa trajto estas, ke sur pentraĵo troviĝas pli ol unu fokuso, kaj ke oni ĝenerale pentras per simpla kaj lakona ŝmirado tenante la penikon horizontale. Ĉina pentraĵo



estas dudimensia, dume mankas al ĝi kontrasto de lumo kaj ombro. Pentristoj povas pentri la grandiozajn Yangzi-riveron, Flavan Riveron kaj Grandan Muron sur mallarĝa kaj longa papero aŭ silkaĵo. Ili pentras amason da montoj, riveroj sur unu papero, kies efiko estas neatingebla per la unu-fokusa diorama de la eŭropa pentrarto. Tamen la pentraĵo ne kontraŭas al la realo, kaj diferenco kuŝas nur en tio, ke la ĉinaj pentristoj denove dispozicias la naturajn pejzaĝojn surpapere por kontentigi la aprecantojn. Per tiu metodo la pentristoj povas libere elvolvi sian imagon, sin liberigi de la vidkampo kaj krei la artan kosmon.

La tria elstara trajto de la ĉina pentrarto estas, ke oni ŝatas surskribi poemojn aŭ aliajn vortojn sur la pentraĵoj, tiel ke la poemoj, aliaj vortoj kaj pentraĵoj kuniĝas en unu artan kompletan. La poemo kaj kaligrafiaĵoj ne nur pliiĝas la etoson de la pentraĵoj, sed ankaŭ harmonias kun ili por pli ĝuigi la rigardantojn. La arta kombino liberigas la ĉinajn pentraĵojn el la limigo de spaco kaj tempo. Pentristoj ofte montras la

kvar sezonojn per vegetaĵoj, malluman nokton per luno aŭ kandelo, kaj ili tre malofte rekte montras tagon, nokton, serenon kaj malserenon sur la pentraĵoj per lumo kaj ombro. Ifoje oni montras la tempon kaj spacon en la pentraĵoj per surskribaĵoj.

La tradiciaj ĉinaj pentraĵoj povas sin



dividi en pejzaĝajn, flor-birdajn, homfigurajn kaj konstruaĵajn, kaj ĉiu el ili povas ankoraŭ esti subdividita. Ĉinaj pentristoj ĝenerale dediĉas sin nur al unu flanko de la pentrarto. Ekz. Zheng Banqiao, fama ĉina pentristo en la 18-a jc., pentris nur bambuojn, orkideojn kaj ŝtonojn, kiujn li profunde konis kaj vivece reaperigis sur la pentraĵoj. Iuj pentristoj pentras nur homojn kaj eĉ nur antikvajn belulinojn. Aliaj pentras nur bestojn, eĉ nur katon, azenon, ĉevalon aŭ alian bestojn.

Laŭ la pentromanieroj, la ĉinaj pentraĵoj povas dividi sin en du specojn. La unua speco estas karakterizita per delikata tuĉado kaj kolorigado; dum la dua karakteriziĝas per tio, ke la pentristoj per simpla kaj maldelikata tuĉado prezentas la formon kaj aspekton de objektoj kaj plie sian intencon. Ambaŭ pentromanieroj cirkulas en Ĉinio dum longa tempo. Se diri ĝenerale, pentristoj de la dua speco devas komenci sian ekzercadon per la pentromaniero de la unua. Ili devas multe sin ekzerci por povi per lakona arta lingvo esprimi la fizionomion de la pentrataj figuroj kaj enkorpiĝi en ili sian ideon.



Tio estas unuaklasa arto malfacile atingebla.

Ĉinaj pentristoj ofte uzas simbolon en sia pentrado, t.e. simboligi objektojn el la realo. Ekz. peonio simbolas belulinon kaj riĉon; pigo simbolas homon, kiu alportas bonan informon; pino kaj gruo simbolas longan vivon; duobla floro sur sama tigo kaj mandarena anasoparo simbolas

geamantojn... Jen ekzemplo: Bambuo farita per strekoj kolordensaj kaj maldensaj svingiĝas kun la branĉoj, tremetas la folioj. Apude legiĝas vortoj "Nefleksebla bambuo en vento". Aprecante la pentraĵon, oni vidas ne nur vivoplenan bambuon, sed ankaŭ ĝian neflekseblecon. Ĉi tie la bambuo ja estas personigita, kaj la pentraĵo prikantas la honestecon kaj neflekseblecon de homoj.

Ĝuste pro tio, ke la ĉinaj pentristoj alte taksas la similecon en spirito, ili ne strebas al rigora simileco de la ekstera formo, dum la okcidentaj pentraĵoj montras la objektojn per facoj, kio estigas sensivon pri tridimensieco. La ĉinaj pentristoj dediĉas pli da atento al la harmoniigo de punktoj kaj strekoj. En la ĉinaj pejzaĝaj pentraĵoj punkto povas reprezenti ne nur arbon, sed ankaŭ ŝtonon, kaj longa strio povas reprezenti malproksiman monton, aŭ marbordon.

Ekzistas alia diferenco inter la ĉina pentrado kaj la okcidenta, t.e. la ĉinaj pentraĵoj ĝenerale estas gluitaj sur papero kun rulaĵoj. Ili povas esti pendigitaj sur muro por aprecado kaj rulitaj por konservado. Dank' al tiu metodo ili estas facile konserveblaj kaj plie okupas malpli da spaco kompare kun tiuj enkadritaj. Ĝuste pri tio la pentraĵoj faritaj per specialaj papero, tuĉo kaj farbo povas konserviĝi pli ol mil jarojn. Hodiaŭ en ĉinaj muzeoj oni povas ĝui pentraĵojn faritajn antaŭ pli ol mil jaroj. ■

Kunlabore kun El Popola Ĉinio
<http://www.espero.com.cn/>

Laŭkonstitucie. de Rex May - <http://lakarutnablogodebaloo.blogspot.com/>



LA PLEJBONON DE LA ESPERANTO-MUZIKO VI TROVAS NUR EN UNU LOKO...

aĉetu originalajn diskojn
VinilKosmo

Saluton!

Jen vi eklegas la lastan eldonon de TEJO-Tutmonde ĉi-jare. La jarfino ĉiam estas tempo, kiam oni reenrigardas kaj taksas la pasintan jaron. Ankaŭ ni nun iom reenrigardos.

Unue mi devas peti pardonon. Certe vi rimarkis, ke en la pasinta eldono de TT mi allogis vin al kelkaj artikoloj, kiujn vi ne trovis. Bedaŭrinde, por ili ne restis spaco kaj mi forgesis reverki la salutvorton. Mi esperas, ke vi senkulpigis min.


Do unue vi legos pri tio, kion mi ŝuldas al vi. Ni revenos ankoraŭ al la Internacia Junulara Kongreso, kiu okazis somere en Ukrainio. Carolin WEEMEYER, 29-jara instruistino el Germanio, pripensos, kio bezonatas por bona IJK. En la IJK ni ankoraŭ restos – Jonathan

KIS-LEV el Israelo estis en ĝi novulo – kaj nun li volas dividi kun ni siajn impresojn.

Ni vojaĝu ankaŭ al Kubo, kie okazis la unua JuSKA. Kio ĝi estas? Legu la koncernan artikolon!

Mi deziras al vi ne nur agrablan legadon dum vintraj someroj, sed ankaŭ belegan etoson dum vintraj festoj, kaj la venonta jaro estu por vi ĉiuj sukcesa, ĝojiga kaj multflanke riĉiga!

Ĝis! Dan



La IJK estas la homoj

CAROLIN WEEMEYER - GERMANIO

Mi, Carolin WEEMEYER, 29-jara instruistino el Germanio, partoprenis la Internacian Junularan Kongreson (IJK) en Kievo kaj volas analizi la pasintan IJK-on kaj IJK-on ĝenerale.

La supre menciita citaĵo estas prenita de la parolado, kiun faris Evgenia Slovaĉevskaja en la lasta vespero de IJK. Evgenia transprenis la ĉeforganizadon de la IJK de Mikaelo Lineckij, kiu pro koratako du semajnojn antaŭ la IJK bedaŭrinde ne povis partopreni. En sia parolado Evgenia klarigis, ke estis malfacile por la LKK transpreni ĉiujn taskojn de Mikaelo, interalie, ĉar “ni ne sciis, kio estas IJK”. La fina frazo estis, ke malgraŭ multaj problemoj kaj mankoj la etoso estis bona, kaj ke “la IJK estas la homoj”. Tiuj frazoj kaptis mian atenton, igis min pensi multege pri IJK, kaj fine igis min verki ĉi tiun tekston.


Por klarigi, de kie venas la sekvaj opinioj: Mi partoprenis ĉiujn IJK-ojn de 2005 ĝis 2011 krom la pasintjaron en Kubo. Krome mi de 2004 ĝis 2009 estis ano de la GEJ-komisiono por renkontiĝoj, kiu preparis la Internacian Seminarion (IS). Miajn tieajn spertojn mi konkludis al la grafikaĵo de “IJK-konstruaĵo”.

La ĉefan, unuan bazon formas la LKK. Nur poste sekvas la partoprenantoj. Diversaj kolonoj tenas la tegmenton, la bonan etoson, kiu laŭ mi formas la celon de la renkontiĝo. Gravas aldoni, ke ne nepre ĉiuj kolonoj bezonatas. Sed manko de pluraj malhelpas al la celo.

Lasu min analizi la pasintan IJK-on laŭ mia grafikaĵo.

- La LKK senkulpe estis sufiĉe malforta pro la supre menciita manko de Mikaelo. Mi tre bedaŭras tion. Tamen aldonindas, ke por la partoprenantoj tute ne klare videblis, kiu havas kian taskon. Fakte, por multaj partoprenantoj, kun kiuj mi parolis, eĉ dum la tuta semajno ne klaris, kiuj estas la LKK-anoj. Simplaj manieroj por tion montri estas alikoloraj nomŝildoj por LKK-anoj kaj prezentofotoj en la programlibro.

Dum akceptado (kiu vere funkciis ekde la dua tago nur), oni estis demandita, kiam oni antaŭpagis (!) kaj LKK-ano ekalkulis ĉiujn kostojn laŭ la kotiztabelo surpapere, tiel ke oni devis atendi longege. Komence oni eĉ ordigu sin laŭ kongresnumero, kiu kutime tute malgravas dum IJK kaj kiun tial kompreneble neniu sciis. Ŝajnas al mi, ke oni tute ne havis datumbazon kaj la aliĝdatenojn. Tiu maniero de akceptado certe ne estas rekomendinda.



- Homoj ĉeestis. Kiel kutime en junulara Esperanto-renkontiĝo estis multaj diversspecaj homoj el diversaj landoj kaj kulturoj, kiu alportis la bazon por la bona etoso.
- La ejo laŭ mi estis netaŭga. Oni povas longe diskuti pri malvarma akvo, truo-necesejoj kaj kurento en ĉambroj. Laŭ mia impresoj plej multaj preferus alian luksnivelon, tamen iel akceptis aŭ devis akcepti la ejon kia ĝi estis. Mia propra opinio estas: Se estas tiaj - por plej multaj nekutimaj - tranĉoj de komforto, oni almenaŭ sciu tion antaŭe (ekz. per lasta informilo). Kaj krome necesejpapero por mi ne estas tiom elstara lukso. La plej grava manko laŭ mi estis tamen, ke apenaŭ ekzistis seĝoj kaj tabloj por libere babilu. Krome mi miris, kiom ofte la vartistinoj kutimis fumpaŭzi (mi kalkulis 11 fojojn dum du horoj), dum ni dronis en rubo kaj malpuro. La koncertejo estis sufiĉe malgranda kaj disponigis seĝojn por maksimume 30 homoj. Bedaŭrinde ke la ejo estis tiom for de la urbocentro.
- Gufujo ne estis. Estis kelkaj provoj de partoprenantoj ekigi ĝin, sed ili estis vanaj ĉefe pro manko de bezonataĵoj. Necesus mallaŭta, tamen ne malcentra ĉambro, tabloj, seĝoj, kandeloj. La gufujestroj boligu akvon kaj ofertu bonajn kaj diversajn teojn, sukerojn, lakton, eble mielon kaj citronon. Bonaj noktaj aldoniĝoj estas trankvilaj koncertetoj kaj literaturaj laŭlegadoj.
- Trinkejo ekzistis. Tie eblis aĉeti aervarmajn trinkaĵojn (fridujo ne estis) kaj kelkajn frandaĵojn. Krome estis tri seĝoj. Sed trinkejo ne nur estas ejo por aĉeti trinkaĵojn. Ĝi ankaŭ kutime estas ejo por festi, diboĉi kaj danci sur tabloj. Ĉi ĉio tute ne eblis.

- Pri la diskejo mi povas diri malmulte, ĉar mi ne enestis dum dancado. Mi pensas tamen, ke laŭ la partoprenantaro kaj grandeco ĝi estis taŭga.
- Ludejo ne ekzistis. Estis pluraj ludrondoj ekstere antaŭ la domo surtere, kaj longaj homlupaj noktoj en diversaj malplenaj ĉambroj de la unua etaĝo (denove: sen seĝoj kaj malpuraj). Estis malfacile trovi kunludantojn, ĉar mankis renkontejo.
- Tipaj filmejoj ne ekzistis. Chuck Smith montris kelkajn mojosajn filmojn en la lernejo dum unu posttagmezo. Tamen estis kelkaj solvendaj malfacilaĵoj rilate la teknikon.
- En la oficejo de la LKK (!) haveblis retaliro ekde la dua tago. Estis multo multaj ŝtopilingoj kaj seĝoj. La sekvo estis, ke oni trovis multajn homojn en la ĉambro, sed ĉefe ne LKK-anojn.
- La taga programo estis sufiĉe bona. Estis Esperanto-kursoj, prelegoj, diskutrondoj ktp. Plibonigebblas la maniero prezenti la programon al partoprenantoj, ekz. per antaŭe preparita programlibro.
- La koncertoj vespere estis sufiĉe sukcesaj. Krom spaco, sidebloj kaj iomaj tekniko-malfacilaĵoj ili estis brilaj. Indus transpreni la tradiciajn IJK-elementojn kiel internacia vespero kun muziko, poemoj, skeĉoj ktp. kaj surscenejaj ludoj kiel "Kiu volas iĝi milionulo" aŭ simile. Por la internacia koncerto pendis listo ĉe la programtabulo, sed neniu ĝin forprenis ĝustatempe. Do homoj ne sciis, ĉu oni rimarkis iliajn proponojn aŭ ne.
- Ne estis unu tuttaga ekskurso al iu ejo apud la urbo, sed estis sep samtempe al diversaj celoj en la urbocentro de Kievo. Mi ne partoprenis la tuttagajn ekskursojn (kiuj cetere komenciĝis je la 12a horo), interalie ĉar mi memstare plurfoje jam estis en la centro. De multaj homoj mi aŭdis, ke la ekskursoj estis bonaj. Mi tamen observis mankojn kadre de la preparoj. Ĉe la programtabulo pendis afiŝo kun sep ekskursproponoj (numeroj 1-7). Apude pendis 12 listoj por registriĝi por la unuopaj ekskursoj. Ne estis menciite kiu numero apartenas al kiu ekskurso. Krome estis menciitaj la nomoj de ekskursgvidantoj, sed pri minimume unu de tiuj mi scias, ke li ne estis informita, ke li gvidu ekskurson. Je la ekskursotago ĉiuj ekskursemuloj kaj grupoj renkontiĝis antaŭ la domo, tiel ke bezonatis longa tempo por ordigi la homamason. Mi aŭdis, ke oni planis uzi la flavajn busetojn por ekveturi. Mi miras, kiel tio funkciis, ĉar ili kutime jam estis plenaj ĉe alveno ĉe nia bushaltejo. Per pli ol dek homoj verŝajne malfacilis eniri.
- Pri kromaj aferoj mi ne volas diri multe, ĉar mi pensas, ke ĉio jam klaras. Mi esperas, ke oni ankoraŭ ricevos adresaron.

Kiel dirite, ne ĉiuj tiuj kolonoj bezonatas por bona IJK. Ekzemple dum IJK en Hanojo la kolonoj "taŭga ejo" kaj "ekskursoj" kaj "programo" portis preskaŭ la tutan konstruaĵon - ĉar ili estis sufiĉe fortikaj, dum tute mankis ekz. trinkejo, gufujo, ludejo kaj filmejo.

Laŭ mia propra takso kaj post multaj babiladoj kun aliaj partoprenantoj, mi pensas ke mi rajtas diri, ke la konstruaĵo "IJK-67" sufiĉe forte ŝanceliĝas. Koncize: La IJK devas esti pli ol nur la homoj.

Mi esperas, ke mia analizo estas klara kaj komprenebla. Mi ĝojas legi viajn opiniojn pri ĝi. Krome mi esperas, ke ĝi povos helpi al sekvaj LKK-oj analizi la preparojn.

Fine de mia teksto mi prezentos al vi la poemon, kiun spontanee verkis mia edzo Robert kaj mi kaj kiun ni laŭtlegis dum la internacia koncerto, lastvespere:

IJK okazas en Kievo,
la ĉefa urbo de Ukraini'.
Alvenas junuloj el tuta mondo
al "Barispal" kaj Ĵuljani.

Flavaj malgrandaj busetoj kievaj
transportas nin al la bazej'.
Ilin eniri kun grandaj pakaĵoj
vere ne simplas plej.

En la bazejo renkontas mi homon
afablan kun granda ridet'.
Li diras "Saluton! Do you speak English?"
kaj mi pensas "Fek! What's that?!"

"La registrejo funkcios nur morgaŭ,
sed jen estas via ŝlosilo.
Bonvolu atendi kaj doni pasporton,
mi tradukas ĝin al la cirilo."

Post longa vojaĝo bezonas reŝargon
moderna teknologi',
sed vane serĉeblas en mia ĉambro
kurento (amiko de mi).

Mi jam fiodoras pro ŝvito tre forte
kaj tial tuj iras al duŝo,
sed eĉ post atendo la akvo malvarmas,
do evidentiĝas jen fuŝo.

Malvarma duŝakvo, malvarma trinkaĵo -
mi pensas, do ek al trinkejo.
Martin atendas kun granda elekto
sen fridujo en bela varmejo.

Post tio vizitas mi la necesejon,
sed fakte ĝi estas nur truo.
Mi pisas kaŭrante kaj poste konstatas
foreston de akvofluo.

Tuj poste mi sentas min jam pli bone
kaj serĉas necesejan paperon.
La solvon de tio mi nun ne rakontas -
ĝi fekas, por diri la veron.

Pli bona pisejo troviĝas en Budmo -
jen brila restoraci'.
Sed ve! Mi konstatas, ke oni forgesis
la mendon de manĝo por ni.

Krom esperantistoj ĉeestas ĉi tie
centmiloj da sangosuĉuloj.
Mian ĉeeston dum longtempo pruvos
la tutkorpaj kulo-makuloj.

Dumtage pro ŝvito mi nur lagumadas,
prifajfas programajn ofertojn.
Vespere mi helpas plenigi diskejon
por ĝui bonegajn koncertojn.

Fine de tiu poemo mi diras
nome de ĉiuj partoprenantoj:
Sanon kaj ĉion bonan al Mikaelo
kaj dankon al la organizuntoj.

Ne nur lingvo – viv-vojo!

Rakonto pri mia unua IJK

JONATHAN KIS-LEV, ISRAELO

Ĵaude, la 14-an de julio, mi finfine komencis mian vojaĝon al la Internacia Junulara Kongreso, en Kijivo. Mi estis tre ekscitita. Mi komencis lerni Esperanton eble kvin jarojn antaŭe, sed neniam iris ankoraŭ al granda kongreso, nur al du etaj, en Jordanio kaj en Germanio. Do, la penso iri al iu granda kongreso kiel IJK, estis nekredible por mi. La Estraro de ELI – Esperanto-Ligo en Israelo, decidis unuanime doni al mi subvenciojn por la kongreso. Ili bone sciis, kiom mi volas iri. Poste, mi ankaŭ estis bonŝanca ricevi subvenciojn de TEJO, Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Mi estis, kaj estas, dankegema por ambaŭ. Ili ebligis al mi vojaĝi al tiu mirinda kongreso.

La 1-a TAGO - Mi Mi vojaĝis el Israelo, per aviadilo, por kiu mi eĉ ne havis flugbileton. La virino, kiu estis la estrino de la flugo, atendis kun mi ĝis la lasta momento, kaj finfine, kiam unu lasta homo ne venis al la flugo, ŝi vendis al mi lian sidlokon. Estis nekredible. Mi do flugis al Ukrainio. El la flughaveno ekster Kijivo mi uzis la instrukciojn de la IJK-retejo, kaj post eble tri horoj, unu buso, unu tramo kaj unu buseto, mi finfine alvenis al la loko. La homoj estis tre agrablaj, kiel esperantistoj estas. Mi ricevis ĉambron kaj havis tri samideanojn kun mi. Mia kapo doloris, do mi iris rekte al la lito kaj bone dormis ĝis la mateno.

La 2-a TAGO - Mi vekiĝis kaj rapide iris al la manĝejo, kie mi manĝis bonegan matenmanĝon. Poste mi parolis kun multaj homoj. Israelo estas tre interesa por homoj, do mi devis respondi al multaj demandoj, sed mi ŝatis tion. Mi renkontis unu familion el la Kanariaj insuloj. La filo, nur 20-jara, konvinkis sian fratinojn, kiu estas pli maljuna ol li, kaj ambaŭ siajn gepatrojn, veni kun li al la IJK. Ili studis Esperanton survoje, kaj lia fratino bonege parolis kun mi. Nekredible kiel facile lerni Esperanton povas esti.

Mi renkontis kelkajn homojn, junajn, el Usono, Germanio, Rusio, Ukrainio kaj multaj aliaj landoj. Posttagmeze ni iris al iu lago, kiu situas en belegaj parko, ne fore de la IJK-ejo. Mi ĝuis la akvon, kaj la belegajn frukt-arbojn, kies fruktojn mi eĉ gustumis.

Mi eĉ partoprenis en la vespero unu renkontiĝon de TEJO, kiel anstataŭanto de la prezidanto de Junulara Esperantista Ligo de Israelo. Tio estis interesa, sed mi sentis, ke estas pli grave por mi renkonti kaj babilu kun homoj Esperante, ol paroli pri Esperanto-agadoj, pri kiuj mi nenion scias kaj fakte ne interesiĝas nun.

Vespere ni manĝis bonege, kaj estis muzika vespero, kaj homoj kantis kaj ludis bele. Mi dormis iomete, vekiĝis je la noktomezo, kaj iris suben al la klubejo, en kiu estis diskejo dum la nokto. Mi multe dancis, kaj ĝuis agigi mian korpon post du tagoj de ne sufiĉa movado laŭ mi. Finfine mi iris dormi pensante pri tio instrui Esperanton rete, YouTube-e, kaj tuŝi milionojn da homoj.

La 3-a TAGO - Mi vekiĝis kaj denove rapide iris al la manĝejo, kie mi alvenis ĝuste lastmomente, antaŭ ol oni fermis la kuirejon. Mi manĝis bonegajn manĝaĵojn, kiuj memorigis al mi la manĝaĵojn de mia patrino, kiu estas rusdevena, kaj migris al Israelo el Moldavio, kiam ŝi estis nur dudek-jara. Estis bongusta, kaj mi pensis iomete pri la hejmo.

Mi ne havis sufiĉe da tempo por pripensi aŭ multe paroli kun homoj, ĉar mi devis iri al kunsido de TEJO. Tio estis interesa, sed denove mi sentis, ke tio ne estas la ĝusta loko por mi, ankoraŭ ne. Mi pardonpetis kaj iris eksteren, kaj sentis, kvazaŭ mi sekvas mian koron. Mi volis esti ekstere, paroli kun homoj, anstataŭ sidi en ĉambro, aŭskulti aĵojn, kiuj estas tro foraj de mi.

La tria tago daŭris, kaj mi plu renkontis interesajn homojn – venezuelanon, kiu loĝas kaj laboras en Dubajo, britinon kiu loĝas en Francio, ktp. Vespere estis kelkaj interesaj dancoj de ukrainanoj, kaj eĉ estis tre interesa kaj amuza spektaklo de ukrainaj tradicioj. La aktoroj, ĉefe ukrainaj, ĝuis, kaj ni

spektantoj ĝuis eĉ pli. Sed eĉ pli ol ni ambaŭ, estis la kuloj, kiuj manĝis ĉiujn en la parko en kiu estis la spektaklo...

La 4-a TAGO - Mi vekiĝis kaj, kiel kutime nun, iris rekte al la manĝejo kaj ĝuis la manĝaĵojn. Homoj estis tre ekscitataj, ĉar tiu ĉi tago estis la tago de la ekskurso al la urbo-centro. Tio komenciĝis je la 12-a, kaj ĝis tiam mi parolis kun mia koramikino en Israelo rete, kaj babilis kun novaj amikoj.

Je la 12-a ni forlasis la bazejon, kaj iris en grupetoj al diversaj lokoj en la urbo. Nia ĉarma gvidantino estis Daŝa, kiu estis komencantino, sed tamen povis montri la urbon al ni. Ni vojaĝis kaj vidis belajn stratojn, kaj supreniris al la monteto, sur kiu Kijivo estis fondita. Ni eĉ vizitis la enon de la Ora Pordego, tiu speciala pordo en la murego de la malnova urbo, kiu estis rekonstruita kaj estis ĉarma. Mi denove lernis, ke mi ŝategas kastelojn. Tute.

Ni revenis al la bazejo, kaj iris tuj manĝi. Mi manĝis du kaj duonan manĝojn, ĉar mi estis malsata post la longa promenado. Mi revenis al la ĉambro, babilis iomete kaj iris dormi, sciante ke mi maltrafas belan muzikon malsupre, sed mi estis tro laca post la mirinda tago.

La 5-a TAGO - Post la kvara tago la tagnoktoj komencis interŝanĝi en mia kapo. Vespere mi dancis aŭ aŭskultis la koncertojn, kaj fakte ĉiam provis enlitiĝi frue, sed ne ĉiam sukcesis. Mi ekdormadis ĉirkaŭ la 12-a aŭ la 1-a, sed laŭ mi, mi estis unu el la nuraj. Fakte, homoj interŝanĝis la nokton kaj la tagon. Mi vere sciis, ke la natura lumo estas tre grava por mia bonfarto kaj miaj emocioj, do mi provis dormi frue. Matene mi manĝis, kaj ofte iris al la komputila ĉambro, por plani mian sekvasemajnan feriadon, iomete labori, kaj paroli kun mia koramikino, kiu restis hejme. Tagmeze mi eble manĝos denove, kaj ofte piediros iomete apud la bazejo. Estis tre stranga loko, kun vojo aŭ malgranda ŝoseo destinita por lernantoj de ŝoforado. Do, mi ofte piediris tien, dirigita de la altaj arboj kaj la verda ĉirkaŭo. Eble poste mi spektos iun Esperanten-tradukitan filmon, aŭ babilos kun samideanoj ĝis la vespermanĝo. Vespermanĝo, koncertoj, lito. Tio estis mia tagordo. Nokte, la loko vekiĝis, multe da homoj, kiujn mi ne vidis antaŭe, ekaperadis, kaj la ŝtuparo en la enirejo, la akceptejo, registarejo, vendejo kaj la diskejo – ĉiuj estis plenaj de homoj. Mirinde.

La 6-a TAGO - En la lasta tago mi estis iomete malĝoja. Mi demandis min, ĉu vi sufiĉe amikiĝis kun homoj? La fakto estas, ke mi, eble por la unua fojo en mia vivo, vere aŭskultis al miaj pensoj kaj sentoj, kaj ne plu penis imponi al homoj kaj tro paroli. Mi ofte estis sola, kaj sentis, ke mi devas esti tia, ĉar sen la tempo en soleco, mi sentus min iomete sen-planke, sen-tere. Do, mi ofte estis sola. Sed en la lasta tago mi estis iomete kolera pri mi mem. Sed mi trankviliĝis, kaj multe parolis kun homoj. Mi estis bonŝanca esti tie Israelane kun Sergeo, kiu fakte multe planis antaŭe kaj prenis 'hummus', 'labane' kaj eĉ aĉetis specon de pano, kiu similas al 'pitoj'. Do, ni havis israelajn lokajn manĝaĵojn. Je la vespermanĝo, ni kune preparis tiujn, kaj kiam ni elparolis kaj laŭtdiris, ke ni disdonos lokan israelan manĝaĵon, la homoj estis tre feliĉaj, kaj montris tion laŭte. Do, ni disdonis la manĝaĵojn, kaj homoj estis tre ravitaj. Oni diras, ke la vojo al la koro pasas tra la stomako. Mi vere sentis tiel.

Nokte estis pliaj mirindaj koncertoj. Mi sentis, ke mi devas disdoni poŝtkartojn de unu el miaj pentraĵoj de Jerusalemo. Do mi staris antaŭ ĉiuj en la diskejo, kaj laŭte rakontis pri la pentraĵo, kaj disdonis la kartojn. Mi sentis min fiera, kaj homoj vere diris al mi, ke la pentraĵo estas belega. Post la mirindaj koncertoj mi parolis kun kelkaj novamikoj, preparis mian sakon, kaj estis unu el la unuaj foriri taksie frumatene.

Survoje al la flughaveno mi sentis min bonŝancega. Mi dankis en mia koro al ELI, kiu donis al mi monon por pagi la flugadon kaj la aliajn kotizojn. Mi dankis al TEJO kiu donis al mi la subvenciojn partopreni en la IJK senpage. Mi sentis, kvazaŭ mi havas novan familion. Mi sentis min tre optimisma pri la futuro de tiu familio. Kaj fakte, komencis revii veni al la venonta IJK, en Japanio, kun mia vera familio, por ke ili vidu, kiel mirinda povas esti tiu stranga lingvo, kiun mi komencis lerni antaŭ kelkaj jaroj. Fakte, ne nur lingvo – viv-vojo. Moĵosa

JuSKA, nia revo realigita

ARIADNA GARCÍA GUTIÉRREZ - KUBO

Ekde la 18a ĝis la 21a de julio en la kampadejo La Salto de la Haloj, provinco Pinar del Río, okazis la 1a Junulara Somera Komuna Aranĝo (JuSKA). Partoprenis ĝin 50 esperantistoj de tri provincoj: Santiago de Kubo, Havano kaj Pinar del Río. La grupo estis tre diversa, ĉar pluraj estis komencantoj, aliaj ĵus finis la unuan nivelon, kaj aliaj estis pli spertaj en la Esperanto-movado, kio bonis, ĉar tiu miksado ebligis atingi nian plej ĉefan celon: kunigi la gejunulojn kaj doni superrigardon pri la junulara Esperanto-movado, enlande kaj eksterlande kompreneble. Kvankam JuSKA ne estis tiom granda aranĝo, nia programo komplete funkciis kaj eĉ estis aldonitaj pliaj programeroj de la partoprenantoj mem, kiuj solaj decidis esplori kavernojn kaj montgrimpi, tio riĉigis la etoson, ĉar ĉiam spontanaj ideoj bone realiĝas.

Grava kaj decida estis la partopreno de la Fratoj EL. Ĝi donis al ni la eblon konatiĝi kun tiu mirinda duopo, kiun formas Jaime kaj Jarcin el Contramestre, Santiago de Kubo. Ili sin nomas Fratoj EL, ĉar ili deziras esti pli internaciaj. Ili ne nur venas EL Contramestre, sed ankaŭ EL Havano, EL Matanzas kaj EL ĉiuj partoj de la mondo. Proksimume en la 90aj jaroj ili esperantistiĝis, sed antaŭ nelonge ili fondis sian duopon kaj komencis agadi por riĉigi la Esperantan kulturon. Ili ankaŭ verkas en Esperanto kanzonojn por la konata muzikensemblo Amindaj kaj repas por ili en kelkaj Esperanto-aranĝoj.

Dum JuSKA ili tre bone simpatiis ankaŭ kun Jany, kiu estas junulino, kiu studas en la universitato muzikon, specife gitaron. Ŝi jam finis la duan nivelon, tre bone parolas la lingvon, ege bone ludas la instrumenton kaj tre bele kantas, do tio estis bona okazo, kiun ili sukcese kaptis por fari kelkajn aferojn kune.

La prelegoj estis aŭskultitaj de tiuj, kiuj ne ĉeestis la kurson. Krome nia instruisto Pedrito organizis konkurson, en kiu inter la temoj troviĝis Historio de la Esperanto-movado en Kubo. Aliflanke ni multe ĝuis la riveron, ni tre aprezis la naturon kaj estis feliĉaj dum la tuta evento, ĉar rezultis bonega etoso dum ĉiuj tagoj. Krome ni ankaŭ sukcesis intervjui gejunulojn, kiuj estis ĵus bakitaj kaj ĉiam hontas aŭ timas paroli pro eraroj, sed ili sufiĉe flue transdonis siajn impresojn pri la aranĝo kaj decidiĝis, kiel ĉiuj aliaj, partopreni ĝin denove venontjare.

Ni estas ĉe Facebook!

Aliĝu al nia grupo TEJO-Tutmonde kaj komuniku kun ni kaj konigu viajn interesojn!

Ĉu vi volas esti informata aktuale?

Jen por vi ekzistas blogo de TEJO Tutmonde ĉe www.tejo.org. Ĝia adreso estas: <http://www.tejo.org/ea/blog/8543> Tie vi trovos la plej aktualajn informojn pri junulara agado tutmonde!

Vi estas niaj legantoj, ni estas via gazeto!

Kontaktu nin kun viaj demandoj, kontribuoj, kritikoj (laŭdoj :-), rimarkoj ktp. al tejo-tutmonde@tejo.org!



TTT-ejo: www.tejo.org

Ĝeneralaj informoj pri TEJO

TEJO estas mallongigo de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo. Ĝi estas la junulara sekcio de UEA, Universala Esperanto-Asocio. TEJO popularigas internacian kompreniĝon per renkontiĝoj, edukaj programoj kaj uzo de internacia lingvo, Esperanto. La organizo defendas la kulturen riĉecon de lingva diverseco, homajn rajtojn de lingvaj minoritatoj kaj tutmondan kompreniĝon per facila aliro al internaciaj kontaktoj. Uzo de Esperanto estas la kadro de niaj klopodoj.

Centra Oficejo de UEA/TEJO

Nieuwe Binnenweg 176 - NL-3015 BJ Rotterdam - Nederlando
Tel.: (01 0) 436 1 044 - Faksilo: (010) 436 1 751
Retadreso: oficejo@tejo.org

Estraro de TEJO

Łukasz ŻEBROWSKI – prezidanto, kunordigo, homaj rimedoj - lukasz@tejo.org
Paulína KOŽUCHOVÁ – ĝenerala sekretario, kulturo - paulina@tejo.org
Alisa NIKITINA – kasisto, financoj, subvencipetado - alisa@tejo.org
Sergey TYRIN – unua vicprezidanto, informado - sergeo@tejo.org
Michael Boris MANDIROLA – dua vicprezidanto, eksteraj rilatoj - michael-boris@tejo.org
Nico HUURMAN – tria vicprezidanto, aktiva trejnado, seminarioj - nico@tejo.org
Tina TIŠLJAR – estrarano, kongresoj - tina@tejo.org
Petra SMIDĚLIUSZ – estrarano, landa agado, edukado - petra@tejo.org

Membroservoj de TEJO

Kiel membro de TEJO vi ricevas:

- la revuon Kontakto kun la rubriko TEJO-Tutmonde
- rabaton por la Internacia Junulara Kongreso
- eblon partopreni en seminarioj
- eblon engaĝiĝi en interesa kaj internacia agado kaj tre grave: vi helpas al la junulara movado de Esperanto!

Se vi aĝas pli ol 30 jarojn kaj volas ĝui la samajn avantaĝojn (kaj revuojn) kiel membroj de TEJO, kaj aldone subteni TEJO-n, vi estas bonvenigata fariĝi Patrono de TEJO. (Pliaj informoj sur www.tejo.org/patrono aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo).

Agado de TEJO

La agado de TEJO konsistas precipe el:

- informado en junularaj medioj pri la lingva problemo en internaciaj rilatoj kaj pri ĝia solvo per Esperanto
- praktika utiligo de Esperanto je la servo de la junularo kaj informado pri tio en junularaj medioj
- okazigo de kongresoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj kunvenoj
- instigado al la membroj de TEJO aktive partopreni en la Esperanta movado.
- Aktiva Trejnado (pli da informoj ĉe www.tejo.org/aktivula_trejnado)
- Eldono de Pasporta Servo (www.pasportaservo.org), la adresaro de gastingitoj kiuj pretas senkoste gastigi esperantistojn; ĉiujare aperas ĝisdatigita eldono.

Subteno la agadon de TEJO

Ekzistas multe da ebloj helpi TEJO-n en ĝia agado. La plej gravaj estas membriĝi aŭ patroniĝi.

Sed vi ankaŭ povas helpi al konkretaj agadoj de TEJO. Mondonacojn al ĝenerala agado de TEJO bv. pagi al la UEA-konto "tejtej" (indiku la celon de donaco, ekz: "donaco por KER" aŭ "donaco por landa agado") Eblas ankaŭ tiel donaci por specifaj celoj:

- Fonduso "Partoprenu IJK-n" – TEJO per ĝi subvencias la partoprenon de TEJO-aktivuloj al IJK
 - Pasporta Servo – eble la plej fama eldonaĵo de TEJO
- Por pliaj detaloj pri pagmanieroj, bv. rigardi ĉe www.uea.org/alighoj/pag_manieroj.html aŭ demandi ĉe la Centra Oficejo.

TEJO dankegas vin pro via subteno!

JES

JUNULARA E-SEMAJNO



27/12 - 01/01

Gdansk - Pollando

simple venu :)
www.jes.pej.pl